

Esperanto 275

aktuell



41. Jähr (2022) №5 (275)

Informationen für Esperantofreunde in Deutschland und Österreich



Foto el la ekskurso dum BET-56 en Klaipėda, Litovio.

Raporto pri la 56-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj 2022 en Klaipėda.

Germana Esperanto-Kongreso: Rekomenditaj ekskursoj dum la GEK en Brunsviko. Protokoll der Bundesversammlung am 05.06.2022 in Oldenburg (Oldb). Österreichische Nationalbibliothek erhält das Archiv des Esperanto-Weltbundes. *•kune•* – revueto de Germana Esperanto-Junularo: Impresoj de Internacia Junulara Kongreso 2022 en Nederlando. Raporto de la 2-a GEJ-Semajnfino en Brunsviko.

Deutscher Esperanto-Bund e.V. Germana Esperanto-Asocio r.a.

Amtsgericht Berlin VR 13651 B
www.esperanto.de/deb (Netzpräsenz)

Bankkonto (por membrokotizoj kaj donacoj)
/ **Bankverbindung** (für Mitgliedsbeiträge
und Spenden): HELADEFIERB,
Sparkasse Odenwaldkreis,
DE 3250 8519 5200 4011 4571.

Spenden und Mitgliedsbeiträge für den
D.E.B. sind steuerlich abzugsfähig.

Oficejo / Geschäftsstelle: Esperanto-Laden
Katzbachstr. 25, 10965 Berlin,
Leitung: **Elke Mondorf**

030 / 5106 2935, 0800 336 3636
Fax: 030 / 4193 5413

gea.oficejo@esperanto.de

Membroprozorgado / Mitgliederbetreuung
DEB: 0800 - 3 36 36 36 - 21
DEJ: 0800 - 3 36 36 36 - 22

Briefpost senden Sie bitte, soweit keine
andere Anschrift angegeben, an die
Geschäftsstelle. Sie wird von dort elektronisch
weitergeleitet. Die angegebenen **Telefon-
Durchwahlnummern** sind nach der
Rufnummer **0800 - 3 36 36 36** zu wählen.

Estraro GEA / Vorstand DEB

Netzpost an / **retmesaĝo** al gea.fe@esperanto.de

Jedes Vorstandsmitglied ist individuell
erreichbar per E-Post-Adresse in der Form
vorname.name@esperanto.de.

Prezidanto / Vorsitzender

Ulrich Brandenburg, Durchwahl: -5111
gea.prezidanto@esperanto.de

Vicprezidanto / Stell. Vorsitzender

Andreas Emmerich, Durchwahl: -5112

Trezoristo / Kassenwart

D-ro Matthias Hecking, Durchwahl: -5113

Sekretario / Schriftführer

Nils Brinkmann, Durchwahl -5125

Administrado / Verwaltung

Barbara Brandenburg, Durchwahl -5125

Suborganizoj / Unterorganisationen

Andreas Diemel, Durchwahl: -5114

Informteknologioj/Informationstechnologie

Franz Kruse, Durchwahl: -5119

Meza generacio / Mittlere Generation

Michaela Stegmaier: Durchwahl: -5126

Jugendvertreter / Junulara reprezentanto

Michael Vrazitulis, Durchwahl: -5118

Germana Esperanto-Junularo / Deutsche Esperanto-Jugend

Michael Vrazitulis, Durchwahl: -5211
michael.vrazitulis@esperanto.de

Komisiitoj / Beauftragte

esperanto.de/deb/beauftragte

Gazetaraj kaj publikaj aferoj

/ **Presse und Öffentlichkeitsarbeit**

Louis von Wunsch-Rolshoven,

Durchwahl: -111 • Fax Durchwahl: -112
louis.von.wunsch-rolshoven@esperanto.de

**Komisiito por retaj kunvenoj / Beauftragter
für virtuelle Treffen Heinz-Wilhelm Sprick,**
gea.zoom@esperanto.de, tel. Durchwahl -5128

Komisiito por rondvojaĝoj/ Rundreisen,
Durchwahl -5123

Uli Ender, uli.ender@esperanto.de

Informmaterialo/Informationsmaterial

Goar Engeländer, Durchwahl: -5127

goar.engelaender@esperanto.de

Mediinecho

Hermann Kroppenber, Durchwahl: -5121
mediinecho@esperanto.de

Libroservo / Bücherdienst

D-ro / Dr. **Wolfgang Schwanzer**,
Pfarrer-Seeger-Str. 9, 55129 Mainz,
Durchwahl: -5122, buchversand@esperanto.de,
www.esperanto.de/buchversand

Komisiito Interreta Redaktado /

Beauftragter Internetredaktion

Thomas Bormann, Durchwahl: -5117
thomas.bormann@esperanto.de

**Vertreter des DEB in der EEU-
Versammlung/Repräsentanto de GEA en la
assembleo de EEU:** Jean-Paul Kuhfahl

Durchwahl: -5116

jean-paul.kuhfahl@esperanto.de

Pliaj adresoj / Weitere Adressen

Germana Esperanto-Junularo (GEJ) /

Deutsche Esperanto-Jugend (DEJ)

Katzbachstr. 25, 10965 Berlin,
030/4285 7899, Fax: 030/4193 5412
www.esperanto.de/gej (Netzpräsenz)

Interkultura Centro Herzberg (ICH) /

Bildungszentrum des D.E.B.

Komisiitoj/Beauftragte: **Zsófia Kóródy**
(instruado), **Peter Zilvar** (klerigado kaj
kulturo), Grubenhagenstr. 6, 37412 Herzberg,
die Esperanto-Stadt, 05521/5983, Fax (05521)
1363, Durchwahlen: -411 (Tel), -412 (Fax),
ich@esperanto.de, www.esperanto.de/ich

Germana Esperanto-Instituto /

Deutsches Esperanto-Institut

Prof. D-ro/Dr. **Martin Haase**, Lehrstuhl für
Romanische Sprachwissenschaft,
Uni Bamberg, Durchwahlen: -431 (Tel),
-432 (Fax), martin.haase@esperanto.de,
www.esperanto.de/dei

Germana Esperanto-Biblioteko /

Deutsche Esperanto-Bibliothek

p/a. **Karl Heinz Schaeffer**, Schulstr. 17, 73432
Aalen, Durchwahlen: -421 (Tel), -422 (Fax)
biblioteko@esperanto-aalen.de
bibliothek-aalen@esperanto.de
www.esperanto.de/bibliothek

Fondaĵo FAME / FAME-Stiftung

Andreas Emmerich, estraro@fame-stiftung.de
(nur por FAME)

Stiftung Mondo

Hauptstr. 42, 64753 Brombachtal,
030/6920 4846-1, stiftungmondo@gmail.com,

Bankkonto: 151100004, Volksbank Stuttgart
eG, BLZ 600 901 00.

Spenden sind steuerlich abzugsfähig.

**Aŭstria Esperanto-Federacio /
Österreichischer Esperanto-Verband**
aef@esperanto.at, www.esperanto.at

Esperantomuzeo Vieno / Esperantomuseum Wien

Palais Mollard, Herrengasse 9, 1010 Wien,
+43/1/53410-731, Postanschrift:
Österreichische Nationalbibliothek, Josefsplatz
1, Postfach 25, 1015 Wien, plansprachen@onb.ac.at, www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/index.htm

UEA-ĉefdelegitoj kaj perantoj / Bundes- beauftragte des Esperanto-Weltbundes UEA Germanio / Deutschland

D-ro / Dr. **Wolfgang Schwanzer**, Adressen
siehe mittlere Spalte: Libroservo/Bücherdienst
Aŭstrio / Österreich

Leopold Patek, Martinstr. 104/38,
3400 Klosterneuburg, Poŝtel.
+43/66473611289,
aon.913548977@aon.at

Esperanto aktuel

ISSN 0942-024 X

Eldonisto / Herausgeber

Deutscher Esperanto-Bund e.V.,
der Vorsitzende (v.i.S.d.P.)

Redaktista teamo / Redaktion:

Stano Marček (Martin/Slovakio),
Yashovardhan Singh, Im Johannistal 23,
42119 Wuppertal. Durchwahl: -54

Kunlaborantoj / feste Beiträger:

Aŭstria Esperanto-Federacio

Hermann Kroppenber (Mediinecho),
Utho Maier (Bibliotheken), Peter Zilvar (ICH)

Presejo / Druck: Alfaprint, Martin, Slovakio
Esperanto aktuel kun *-kune-* havas ses
numerojn jare kaj estas abonebla ĉe la oficejo
(vidu maldekstre supre) por 19 €
(de eksterlando: 25 €) jare.

Esperanto aktuel mit *-kune-* erscheint
sechs Mal pro Jahr. Abonnierbar bei der
Mitgliederbetreuung (s.o.). Abonnement: 19 €
(Ausland: 25 €) jährlich; für ordentliche
Mitglieder im Beitrag enthalten.

Anoncoj / Anzeigen:

Skribu al / Schreiben Sie an: deb@esperanto.de

Kontribuoj / Beiträge

Bv. sendi viajn kontribuojn (en formato *.doc
a.s.) al ea@esperanto.de, por n-ro 2022/6 ĝis la
15-a de novembro 2022. Paperaj kontribuoj nur
esceptkaze, tiam al Yashovardhan Singh (vidu
supre). Senden Sie Ihre Beiträge bitte
(im Format *.doc o.ä.) an ea@esperanto.de,
für Nr. 2022/6 bis zum 15. November 2022.
Papierbeiträge nur im Ausnahmefall, dann
an Yashovardhan Singh (s.o.).



Karaj legantoj,

Esperanto neniam paŭzas, precipe ne dum somero. Multaj el ni uzis la okazon por kongresi, aŭ ĉeesti feriosemajnojn en esperantista medio. Por kelkaj eventoj GEA eĉ povis doni subvenciojn el la Erasmus+-programo de Eŭropa Unio, kondiĉe, ke ili rilatis al klerigo de plenkreskuloj. Por la ĉi-jara Universala Kongreso, kiu okazis ekster EU-Eŭropo, tio ne eblis. Tamen – kaj malgraŭ la altaj kostoj por la vojaĝo kaj restado – venis bona nombro de partoprenantoj el Germanio. La UK en Montrealo estis bonege preparita (dum 8 jaroj, se mi ĝuste memoras). La Loka Kongresa Komitato dum tiuj multaj jaroj ne perdis sian entuziasmon kaj vekis multajn simpatiojn. Rezulto estis kongreso ne tre multnombra, sed tamen kuraĝiga. Sub gvido de Mark Fettes la kongreso tre serioze kaj altnivele traktis la temon „indiĝenaj lingvoj“ (grandan temon en Kanado: mi mem eklernis la aniŝinabekan, lokan lingvon el la Montreala regiono). La scienca programon same altnivele organizis Amri Wandel. Ambaŭ prelegserioj almenaŭ parte okazis en hibrida formo, por aldoni pli da kvanto al la kvalito. Interesaj por mi ankaŭ estis la multaj interparoloj kun esperantistoj el Kanado kaj Usono, kiujn oni malofte vidas ĉe ni. En ambaŭ landoj rekreskis vigla Esperanto-sceno, tro malmulte konata en Eŭropo, kaj precipe por la kanadaj samideanoj la kongreso sendube donis aldonan impulson. Por UEA ĝi markis komencon de transira periodo: ekfunkciis nova kongresa fako kun sidejo en Slovakio, malpleniĝas la konata domo en Rotterdam kaj (re-)elektiĝis estraro por la venontaj tri jaroj.

Kio atendas nin en Germanio? Komence de septembro, kiel ĉiujare, la estraro kunvenis en la Berlina Oficejo. Feliĉe tio eblis sen pandemijaj limigoj. Ĉefaj taskoj de la asocio restas informa laboro kaj renkontiĝoj. Nia 99-a kongreso en Oldenburg estis tre sukcesa: sekve de ĝi, en la kadro de nia Erasmus-projekto kun Esperanto Nederland, eĉ baldaŭ aperos publikaĵo kun ĉiuj kontribuoj pri la temo daŭripova evoluigo. Bone progresas preparoj kaj aliĝado por nia 100-a kongreso 2023 en Braunschweig; pri programo kaj publika mesaĝo de tiu jubilea evento ankoraŭ necesas iom pripensi. Sed aliaj tradiciaj eventoj suferas pro la kronviruso: precipe la paska PSI, kiu bezonas novan puŝon (kaj pli da ĝustatempaj aliĝantoj). La jarfina Luminesk' estas planata kiel kutime; ankaŭ aliĝoj venas. Antaŭ jarfino la pandemijaj reguloj povus denove fariĝi pli striktaj, sed aliĝintoj nenion riskas. Se GEA devas nuligi siajn renkontiĝojn, ĝi ĉiujn antaŭpagojn repagos. Bone fartas la Esperanto-Migrado Aŭtuna (ĉi-jare ĉirkaŭ Detmold), kiu jam komence de septembro havas 18 aliĝintojn.

Mi ne forgesu alian gravan daton por Germana Esperanto-Asocio. De la 4-a ĝis la 6-a de novembro kunvenis en Herzberg la Asocia Konsilantaro (Verbandsrat), la ĉefa renkontiĝo de aktivuloj inter niaj kongresoj. Venos estraranoj kaj komisiitoj, aktivuloj el landaj ligoj, fakaj asocioj kaj lokaj grupoj. La aŭtuna kunveno en Herzberg post du pandemijaj jaroj denove estos okazo por sen tro da formalaj diskutoj la perspektivojn de la asocio, interŝanĝi spertojn kaj teni kontakton kun la „Esperanto-urbo“, kiu ekde lasta aŭtuno havas novan urbestron. GEA ekde majo 2023 havos novan estraron: ankaŭ pri tio necesas paroli, ĉar pluraj el la nunaj estraranoj ne rekandidatiĝos. Ĉu por la Esperanto-Centro Herzberg, por aliaj lokaj iniciatoj, aŭ por la tuta asocio: daŭripovo ne nur estis la temo de nia ĉi-jara kongreso, sed ĝi restas konstanta defio. Bonaj ideoj – kaj precipe: realigantoj de bonaj ideoj – estas ĉiam bonvenaj.

Amikajn salutojn,

via **Ulrich Brandenburg**

Enhavtabelo/Inhalt

1: Partoprenantoj de BET-56 rigardas lignan skulptaĵon dum ekskurso al Juodkrantė. La foton faris Hildegard Stecay (legu sur la p. 4-5).

2: Adresoj.

3: Germana Esperanto-Asocio: Karaj legantoj. Enhavtabelo.

4-8: Renkontiĝoj en najbaraj landoj: Raporto pri la 56-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj 2022 en Klaipėda, Litovio. Brescia ist eine Reise wert. KEF en Svislando: impona aranĝo, eĉ se nur kvalite.

9-12: Germana Esperanto-Kongreso: Eindrücke vom 99. Deutschen Esperanto-Kongress. Rekomenditaj ekskursoj dum la GEK en Brunsviko. Empfehlenswerte Ausflüge während des GEK in Braunschweig. Protokoll der Bundesversammlung am 05.06.2022 in Oldenburg (Oldb).

13-14: Interkultura Centro Herzberg: Einweihung einer sog. „Esperanto-Bank“ vom Harzklub Herzberg. Inform- kaj varbeblecoj far fakaj, resp. laŭtemaj ekspozicioj.

15-17: Aŭstria Esperanto-Federacio: Österreichische Nationalbibliothek erhält das Archiv des Esperanto-Weltbundes (Universala Esperanto-Asocio). Esperanto- Materialien in Wien. Rakonto pri vojaĝo tra la tempo, lasta parto. Komento pri la tria legogustumaĵo de la vojaĝo de Boltzmann en la Eldoradon. Boltzmann, la germana profesoro. Boltzmann, deutscher Professor.

18-20: Publika agado: Wie Esperanto die Welt sieht und ordnet: Das Esperanto-Paradigma. Mit der halben Welt in Halbe oder keine halben Sachen. Das sperrige Esperanto-Wort „retro“.

21-22: Medienecho.

23-24: El bibliotekoj kaj arkivoj: Folge 67 – neniam plu! – nie wieder! ?

25-31: kune – revueto de

Germana Esperanto-Junularo: Enkonduke. Einladung zur DEJ-Mitgliederversammlung 2022. Impresoj de Internacia Junulara Kongreso 2022 en Nederlando. Ostereiersuche, Mazi und alle Jahre wieder ein bisschen Esperanto. Raporto de la 2-a GEJ-Semajnfino en Brunsviko. Rakonto (parto 2/2): La malklara akvo.

31-32: Fotoj el la lingva festivalo LingvaFest' 2022 en Halbe (la artikolo sur la p. 19).

Raporto pri la 56-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj 2022 en Klaipėda, Litovio

La 56-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-56) okazis en la urbo Klaipėda, Litovio, de la 9-a ĝis la 17-a de julio 2022.

En la jaro 1959 Biruta Rozenfelde invitis esperantistojn el la baltiaj landoj Estonio, Litovio kaj Latvio al Baltia Esperanto-Tendaro por renkontiĝi, ĉar landaj asocioj dum tiu tempo en Sovetunio ne estis permesitaj; ŝi ankaŭ partoprenis la 56-an BET-on. Kvarfoje oni malpermesis BET-on. Poste ĝi iĝis tut-sovetia kunveno de SEJM (sovetia Esperanta junulara movado) ĝis la disfalo de Sovetunio.

Ni alvojaĝis triope per giganta pram-ŝipo, rekte de Kiel ĝis Klaipėda; envojaĝante en la grandan havenon, du modernaj altaj konstruaĵoj okulfrapis nin, kiuj dum la preterveturado kun-gelis.

Klaipėda havas ĉ. 200, Kaŭno 400 kaj la ĉefurbo Vilnius 600 mil da enloĝantoj.

250 homoj aliĝis al BET-56: el 19 landoj inter Koreio, Pakistano, Serbio, pluraj EU-landoj, Islando kaj Usono; bedaŭrinde preskaŭ 20 el Rusio kaj Belorusio ne povis veni; eĉ ne el la proksima urbo kaj rusia provinco Kaliningrado (germane Königsberg).

La kongreso estis dediĉita al la 770-jariĝo de Klaipėda (germane Memel), kaj 135-jariĝo de Esperanto. La kongresa libro sur 146 paĝoj montras, krom la organizajn informojn, multajn historiajn kaj geografiajn raportojn pri Litovio kaj pri unuopaj BET-oj, la litovan lingvon, 13 litovajn Esperanto-poetojn; vidindaĵojn de la urbo kaj informojn pri la prelegoj.

La solena malfermo okazis en la koncerta salono de la urbo. Pli ol 16 prelegoj (parte seriaj), 5 SUS-prelegoj de AIS (Somera Universitato – organizite de Amri Wandel) kaj pli ol 10 kulturaj aranĝoj okazis en diversaj konstruaĵoj de la Universitato de Klaipėda. Tute proksime ni hazarde vidis kaj vizitis grandan tombejon por germanaj soldatoj el la du mondmilitoj, flegata de germana asocio por soldato-tombejoj.

Instruistoj por Esperanto-kursoj:

Aida Ĉizikaitė, Nina Petuchovska, Abdurahman Junusov, Mikaelo Lineckij, Svetlana Smetanina, Gražina Opulskienė, Dalia Pileckienė (paroliga kurso).



Ekskursantoj en la dunoj de Nida ĉe la rusia limo. Foto: Ulrich Brandenburg.



Ekskursantoj en la skulptajoparko sur la terlango. Foto: Ulrich Brandenburg.

Kleriga kaj eduka programo:

Ulrich Brandenburg: 99-a Germana-Nederlanda Esperanto-Kongreso pri daŭripovo; Nina Danylyuk: Historiaj kaj kulturaj rilatoj inter Litovio kaj Ukrainio; Aida Ĉizikaitė: Litovaj lingvo kaj kulturo; Degiminas Degėsys: Nigra Afriko – kulturo kaj filozofio; Stefan McGill: Aktivula Maturigo, AMO-Seminario pri Baltio; Jozef Reinvar: Ŝanco por nia movado – neesperantista kompanio VERTERA Organic; Nijolė Žambaitė: Mitoj pri diplomatio kaj diplomatoj; István Ertl: ateliero pri tradukado;

SUS-Prelegoj:

Amri Wandel: la nova James Webb kaj aliaj spac-teleskopoj; Carlo Nicola Colacino: Gravitaj ondoj; Duncan Charters, prezidento de UEA: Ciklo pri komunikado; Alfred Heiligenbrunner: Imunologio; Manfred Westermayer: Marĉoj – por stoki CO2 kaj subteni biodiversecon; Bruĉjo Kasini: „30 Oraj Horoj“ – instruado en italaj superaj lernejoj; Ilona Koutny: 5 prelegoj pri Esperantologio; Ryszard Rokicki: morfologio de Esperanto – alternativa vortformado;

Kultura Programo:

Sepa kaj Asorti: skuis la koncert-salonon, instigis al (preskaŭ) tut-salona polonezo; Anjo Amika: kantis preĝejajn kantojn; Tuomo Grundström: finnaj-estonaj verkistinoj Hella-Maria Wuolijoki kaj Aino Julia Maria Kallas; Suzana (Kornicka): kantoj el diversaj landoj; Saša Pilipović el Serbio: aktorin kaj kantis; Margarita Želve: kvar granddamaĵoj de latvia Esperanto-poezio; Mikaelo Lineckij kune kun Mikaelo Bronštejn (virtuale): rakontoj kaj kantoj el SEJMa-epoko; Mikaelo Bronštejn (virtuale): prezento de judaj bardoj, viktimoj de nazia teroro, Mordeĥaj Gebirtig kaj Iĉĥok Kacnelson; kaj lia nova libro pri Simeono (Podkaminer), sovetia Esperanto-aktivulo.

Necesas aldoni, ke la LKK-anoj ege bone preparis ĉion; la libroservo estis alirebla dum ĉiuj tagoj. La matenmanĝo kaj tagmanĝo en la universitato estis provizitaj de studenta teamo – ĉiufoje bona en vegetara (kun fiŝoj) kaj vianda versioj; matene kutime estis kaĉo kun aldonaĵo.

Indus prezenti la nomojn de la LKK-anoj, el tiuj 27 mi nur citas Povilas Jegorovas (prezidanto de LEA) kaj Aleksander



Koncerto de la ukrainanoj.
Foto: Ulrich Brandenburg.

Korĵenkov (La Ondo, Kaliningrado), kiuj subtenis informadon kaj kompostis la kongreslibron, Asta Nastaravičiūtė (sekretariino de LEA), Irena Jagminaitė (konstanta libroservo) kaj Taesok Choe (redaktis la Lumturon, ĵurnalon de BET-56);

Bedaŭrinde la kunvenoj komenciĝis nur je la 11-a antaŭtagmeze, tial necesis tro ofte decidi inter la paralelaj.

Serio da prelegoj estis pri la litova lingvo, kulturo kaj historio. Kelkaj vortoj de la litova similas per du komunaj konsonantoj, parte per vokalo, al germanaj vortoj, aparte se oni pripensas moligon: ekzemple: rukti = rauchen. La litova alfabeto konsistas el 32 literoj, prononco parte similas al Esperanto: ĉ = ĉ; ŝ = ŝ; ch = h; interesa estas la distingo inter du diversaj „e“: malferma kiel en Esperanto „e“ kaj ferma „e“ kiel „Emil“ en la germana.

Litova etno en tiu regiono ekloĝis jam 3000 jarojn a.K. La unuafoja dokumento pri litova ŝtato estis en 1009 en la Jarlibroj de Quedlinburg, kaj poste en 1253, kiam la Papo kronigis reĝon Mindaugas. Ek de tiu tempo Litovio estis ligita kun germanoj (i.a. Germana Ordeno), poloj (komuna regado) kaj rusoj (1795 – 1918, kaj 1944 - 1990); sed ĉiam restis la etna popolo de litovoj, kiuj sukcesis konservi sian lingvon kaj parte ankaŭ natur-religian kulturon, simile al la etnoj en Latvio kaj Estonio. Ili lernis el sia historio, ke necesas komunuma spirito por la patrio, ĉar la grandaj najbaroj ĉiam pretus regi super ili. La ĉeno de kantantaj homoj je 600 km trans tiuj 3 ŝtatoj „La Baltia Vojo“ en Aŭgusto 1989 estis la videbla komenco de nuna sendependeco de la 3 baltiaj ŝtatoj. Litovio la 11-an de marto 1990 kiel unua soveta lando deklaris sian sendependiĝon.

Du ekskursoj okazis duontage – piede konatiĝi kun la urbo Klaipėda, kaj Japana Ĝardeno:

La centro de la urbo kuŝas sude de rivereto Danė, je la alia flanko estas parko, kiu laŭlonge de la vojo montras la ĉefajn datojn de Litovio laŭlonge de pluraj reĵoj – tre interesa ideo montri la historion. La vojoj en la malnova urbocentro estas originale pavimitaj, domoj plejparte originale restaŭritaj. Meze de la Teatra Placo staras monumento de „Ännchen von Tharau“, ĉar Simon Dach, la verkisto de tiu poemo, naskiĝis en Memel – interesa por germanaj vizitantoj. La Historia Muzeo pri la urba kulturo kaj historio montras plurajn originalajn mapojn, meblojn, folklorajn vestaĵojn, ktp. La klarigoj estas en la litova, angla kaj germana.

En la proksima regiono Ŝilutė troviĝas kelkaj protestantaj preĝejoj, sed Litovio plejparte estas katolika. Tio estas sekvo de la subteno de la pola reĝo je la bataloj (ĝis 1410 – Tannenberg / Grundwald) kontraŭ la Germana Ordeno. En Litovio ankaŭ ekzistas oficiala nov-pagana religio Romuva. Pri ili mi vidis sanktejon kun paganaj simboloj en la regiono de Kaŭno.

Du ekskursoj okazis tuttage: Mi partoprenis tuttagan ekskurson en la regiono Ŝilutė, en tiel nomata Malgranda Litovio – kiu estis la plej nordorienta parto de Germanio ĝis 1919 – laŭlonge de la laguno ĝis Memel, inkluzive de la delto de Nemunas. Tiu estas granda naturprotektita regiono, bone ekipita per lignaj padoj super la marĉoj por eko-turismo. Ni vizitis la kabon Windenburg (nun Ventė) – vere ventumita loko, je fino de malgranda duoninsulo, kie staras lumturo, kaj tie vizitis instituton por protekti migrantajn birdojn, ĉar tie estas bona loko kapti ilin, mezuri kaj ringumi ilin – kaj poste ili rajtas daŭrigi. La unua birdo-stacio ek de 1901 troviĝas en Rossitten (nun Rybaĉij aŭ Rasytė, Kaliningrada regiono), je bordo de Balta Maro. Poste ni veturis per boato sur la delto de Nemunas, por vidi tiun specialan naturon, ĝis la malferma laguno, kie relative altaj ondoj iom moviĝis la boaton, kaj albordis en Ruĝ (nun Rusnė), kie komenciĝas la delto – kaj la limo al Rusio.

Mirinde, je la river-bordo ĉe limo al Rusio, ni trovis monumenton por Mahatma Gandhi kaj Hermann Kallenbach, kiu naskiĝis en tiu regiono, kaj subtenis Gandhi 1910 en Sudafriko.

Post BET ni vizitis Kaŭno, dum 2022 unu el la tri kulturaj ĉefurboj de Eŭropo. Indas viziti ĉiam – ekzemple la muzeon pri la litova komponisto kaj pentristo Ĉiurlionis; pri liaj pentraĵoj ekzistas poemoj de Salomėja Nėris – kiujn ni ricevis kun ilia traduko al Esperanto en la libroservo de BET. Danke al Asta ni povis viziti la historian muzeon en la IX-a Fortikaĵo. Aparte interesis nin la detala ekspozicio pri la nazia tempo. Ni ankaŭ vidis la domon de familio Zilbernik en la Zamenhof Gatvė 5, kiu bezonus riparon – sed ne klaras, kiu respondecas.

(Aŭtoro: Manfred Westermayer)

La alia ekskurso estis al la Kurŝa Terlango (Kurona Duoninsulo), pri kiu Halina Gorecka (Kaliningrado) en la kongreslibro prezentis tre detalan eseon – kaj jen la raporto de Hilde Stecay:



En la centro de Klaipėda.
Foto: Ulrich Brandenburg.



Ekspedantoj
en la dunoj de Nida
ĉe la rusia limo.
Foto: Ulrich
Brandenburg

Per buso ni veturis sur pramo 500 m de Klaipėda al vilaĝo Smiltynė (germane Sandkrug), en la orienta fino de la terlango. Jam Alexander von Humboldt en printempo 1829 vizitis ĝin. De Smiltynė ni veturis al la vilaĝo Juodkrantė (Schwarzort), kie ni promenis tra arbaro sur la Raganų kalnas, t.e. „Monto de Sorĉistinoj“, ĝis la pinto de tiu monteto. En 1979 laŭlonge de la pado estis starigitaj lignaj skulptaĵoj, ekz. sorĉistoj kaj sorĉistinoj, diabloj, drakoj kaj aliaj figuroj el la litova mitologio. Post komuna tagmanĝo ni grimpis ĝis 67 metroj al la pinto de la duno. De tie oni povas rigardi ĝis la rusia tereno.

La terlango konsistas el gigantaj sablaj dunoj, kiuj migradis dum la pasintaj jarcentoj kovrante plurajn vilaĝojn. Nur fine de la 19-a jarcento per plantado de pinarboj oni sukcesis stabiligi la dunojn. Intertempe pinoj kovras grandan parton de la terlango. Por protekti la dunojn estas instalitaj lignaj padoj por turistoj, kiuj tiel povas grimpi la dunojn kaj rigardi aŭ la maron, aŭ la lagunon, aŭ la arbaron.

Nia lasta celo estis la urbeto Nida, ekde 1880 kuraĉloko, kie artistoj, verkistoj kaj nobeluloj i.a. el Königsberg ŝatis pasigi siajn feriajn tagojn. Nida havas ĉ. 1500 enloĝantojn kaj estas multe vizitata de turistoj i.a. pro la domo de Thomas Mann, kiu feriiis tie dum tri someroj. Nun la domo estas muzeo kaj loko, kie okazas eventoj honore al Thomas Mann.

Dum nia revojaĝo al Klaipėda ni paŭzis ankoraŭfoje apud Juodkrantė kaj vizitis koloniojn de kormoranoj kaj grizaj ardeoj, kiuj estas ŝatataj de turistoj, sed ne de fiŝkaptistoj, kiuj estas malkontentaj pri tia amaso da birdoj, kiuj kaptas fiŝojn kaj malpurigas la pejzaĝon.



Partoprenantoj ĉe la monumento
„Anneken von Tharau“

Brescia ist eine Reise wert

Dem Ruf ihrer Freunde aus der Welterbestadt Brescia folgend sind vier Esperantosprecher aus der Esperantogruppe der Wissenschaftsstadt Darmstadt mit Unterstützung durch das Erasmus+-Programm in ihre Partnerstadt gereist, um am diesjährigen Esperantokongress des italienischen Verbands vom 27.8.-3.9.22 teilzunehmen.

Eine Selbstverständlichkeit und Ehrensache, denn das Thema lautete: **Frieden kommt nicht von ungefähr: die aktive Rolle der Partnerstädte beim Aufbau eines geeinten Europas.**

Der von der Stadt Brescia stark unterstützte Kongress bot den aus über 15 Ländern kommenden Teilnehmenden und der Stadtbevölkerung allabendlich Kulturveranstaltungen im Innenhof des Stadtpalasts, dem Broletto an. Die Einladung zu den Veranstaltungen war auch in allen Verkehrsmitteln ausgehängt, um auf das „Festival der Esperantokultur“ hinzuweisen.

Im Kongresshotel fanden zahlreiche Veranstaltungen für die gut 200 Teilnehmenden statt. Nach dem IEF-Vorsitzenden, Luigi Fraccaroli, begrüßte François Lo Jacomo als neuer Fachreferent für Städtepartnerschaften bei UEA die Anwesenden.

Vormittags konnten die Teilnehmenden verschiedene Sprachkurse oder Seminare besuchen. „Aktuelle Konflikte im Mittelmeerraum“ oder „Soziale Netze“ waren Themen. Der Nachmittag war dem Kongresssthema gewidmet.

Die Darmstädter beteiligten sich mit einem Vortrag zum Kongresssthema: „Jugendstil, Art nouveau, De Stijl, Arts and Crafts, Secession – Partnerstädte verschwistert in der Kunst.“

So sollte die neue Welterbestadt Darmstadt mit ihrem Geflecht aus 16 Partnerstädten einem internationalen



La kurso por eksterlandanoj.



Publikum vorgestellt und dabei Gemeinsamkeiten mit den anderen Partnerstädten aufgezeigt werden. Detlef Haußner wollte darauf hinweisen, dass städtepartnerschaftliche Begegnungen gerade unter thematischen Gesichtspunkten erfolgen könnten – „Jugendstil“ als Beispiel.

Auf großes Interesse stieß der Vortrag von Jean-Marc Leclercq (besser bekannt als JoMo). Er ist ein herausragender Kenner der okzitanischen Sprache und erläuterte, welche Probleme unterdrückte Sprachgemeinschaften haben.

Im fachkundigen Vortrag von Mireille Grosjean aus der Welterbestadt La Chaux-de-Fonds konnten die Anwesenden von der Sprachenverteilung und der Sprachproblematik in der benachbarten Schweiz erfahren.

Für Eisenbahnfreunde berichteten Vito Tornillo über Hybridzüge, Riccardo Lamperti über „nationale oder kulturelle Identitäten“ und Javier Alcalde gab eine Einführung in „Esperanto und Anarchismus, wann, wo, warum und wie.“

Schließlich berichtete Luigi Fraccaroli über die „Biochemie des Verliebtheits“.

Olga Vdovychenko veröffentlichte schon vor Jahren Gedichte exilierter Frauen. Sie kümmert sich jetzt intensiv um viele seit dem Kriegsbeginn neu angekommene ukrainischen Frauen.

Allabendlich um 21.30 Uhr gab es dann im illuminierten „Open-Air-Festsaal“ inmitten der Stadt öffentlich und hochkarätig besetzte Konzerte, Filme und Theaterstücke als „Festival der Esperanto-Kultur“ zu erleben.

Filmvorführungen und Fachkonferenzen einzelner Unterverbände, Buchvorstellungen und der Bücherdienst rundeten das Programm ab.



Aŭskultante prelegojn.



Debora Rosetti kaj Luigi Fraccaroli, kantante.

Verschiedene Ausflüge führten in die Stadt und die Region.

Gegen Ende fand eine öffentliche Podiumsveranstaltung statt, die die Rolle der Partnerstädte für ein Streben nach Frieden auf dem europäischen Kontinent beleuchten sollte. Die Vize-Bürgermeisterin Laura Castelletti, die auch die besonders engen Beziehungen mit Darmstadt zu Beginn der Covid-Pandemie hervorhob sowie Marc Giraud aus Paris und Detlef Haußner aus Darmstadt konnten aus ihrer Erfahrung umfassend Auskunft geben.

Zum Abschluss des Kongresses gab es noch ein gemeinsames Singen, angeleitet von Debora Rosetti und Luigi Fraccaroli, dem Vorsitzenden des italienischen Landesverbands und der Esperantogruppe von Brescia, dem mit seinem Team ein wunderbarer Kongress gelang.

Spätestens in Turin – zum 108. Weltkongress – werden sich die meisten dann wiedersehen.

Detlef Haußner

KEF en Svislando: impona aranĝo, eĉ se nur kvalite

La svisa urbo La Chaux-de-Fonds estas fama inter esperantistoj pro la Kultura Centro Esperantista (KCE) fondita en 1968.

Nuntempe KCE estas ligita al Esperanta Civito. Iom supriĝe KCE kaj Studenta Esperanta Ligo invitis al la 11-a Kultura Esperanto-Festivalo en La Chaux-de-Fonds en Svislando de la 9-a ĝis 15-a de aŭgusto 2022, post 10 KEF-oj, organizitaj de skandinavaj esperantistoj inter 1986 kaj 2013 en Svedio, Danio kaj Finnlando.

La ĉi-jara KEF allogis min pro pluraj kialoj – pro mia deziro finfine viziti tiun ĉi faman esperantistan centron, sed aparte pro la anoncita mirige abunda programo. Precipe pro la anonco de koncertoj de pluraj el miaj plej ŝatataj esperantistaj kantistoj mi ne povis rezisti aliĝi.



Kaj efektive KEF eĉ alte superis miajn atendojn. Laŭ partoprenantaro temis nur pri malgranda aranĝo – ni estis 20 tuttempaj partoprenantoj, al kiuj aldoniĝis 10 partatempuloj, kiuj alvenis plejparte por kontribui al la programo kaj restis nur unu aŭ du tagojn. Sed laŭ programo KEF apartenis al la plej bonaj aranĝoj, kiujn mi iam ajn vizitis.

Aparte ĝojiga estis la ĉeesto de KAJTO, famega muzik-grupo, konsistanta nun el la duo Ankie kaj Nanne. Ili faris ne nur belegan koncerton por ni, sed ankaŭ kantigis nin dufoje en muzika ateliero per siaj jen pensigaj, jen amuzaj, sed ĉiam mirinde harmoniaj kantoj. Ili partoprenis la tutan KEF kaj zorgis ankaŭ ekster siaj programeroj pri agrabla atmosfero. „Mi ne sciis, ke KAJTO estas tiel simpatia“, diris KEF-ano, kiu konis la muzikgrupon antaŭe nur el la reto.

Plia elstara programero estis por mi la koncerto de Chiara Raggi. Ŝiaj kantoj estas plenaj je sentoj kaj emocioj, kaj estis aparte bele ĝui ilin de proksime en malgranda rondo. Sukcesaj estis ankaŭ koncerto de Anjo Amika en preĝejo kaj koncerto de JoMo dum la lasta vespero: Li sukcesis dancigi pli-malpli ĉiujn KEF-anojn. Unu semajnon poste li ripetis sian koncerton en la Itala Esperanto-Kongreso, kie malgraŭ dekobla partoprenantaro dancis apenaŭ pli da homoj.

Menciindas krome diversaj korpaj ekzercoj, ekzemple pri jogo kaj ĉigongo, kaj aparte la masaĝoj de Katalin Farago, kiuj freŝigis nin korpe kaj anime. Ŝi klarigis al ni ankaŭ la Yumeiho-terapiion. Sukcesaj estis ankaŭ multaj pliaj programeroj, ekzemple de Giuliano Turone, kiu aktore prezentis al ni diverslingvajn tradukojn de la Dia Komedio de Dante, kaj ronda tablo pri la Esperanta kulturo en la 2020-aj jaroj.

Al la sukceso de la aranĝo kontribuis ankaŭ la internacieco – ni venis el 8 diversaj landoj kaj apenaŭ krokodilis – kaj la



Giorgio Silfer, lia edzino Perla Martinelli, JoMo (maldekstre) Ankie van der Meer (dekstre) kaj aliaj KEF-anoj dum diskuto pri la Esperanta Kulturo en la 2020-aj jaroj.



Emānuele Regano (IT), Manuela Blanco (ES), Giorgio Silfer (IT/CH), Anjo Amika (Anna Bartek, HU) kaj Alessio Giordano (IT).

bonegaj manĝoj kuiritaj de nia organiza teamo en KCE. La partoprenantoj ĉiurilate tre kontentis pri la aranĝo. La kosto por tranoktado inkluzivis turisman karton, per kiu ni povis tute senpage vojaĝi per ĉiuj trajnoj kaj busoj en la kanton Neuchâtel kaj viziti tie ankaŭ, same senpage, la muzeojn. En La Chaux-de-Fonds aparte plaĉis al mi la Horloĝa Muzeo (pli el arta ol el teknika vidpunkto) kaj la Muzeo pri Belaj Artoj (kun pentraĵoj i.a. de Van Gogh).

Resume, temis pri belega kaj tre harmonia aranĝo. La unua KEF en Svislando estis tre sukcesa – eble nur kvalite, sed tio ja plej gravas. Ĝi pruvis, ke Esperanta Civito kapablas riĉigi nian kulturon ne nur per eldonaĵoj, sed ankaŭ per interesejaj aranĝoj. Jam ekzistas plano okazigi la KEF ekde nun ĉiusemere en La Chaux-de-Fonds, la venontan fojon tuj antaŭ la UK en Torino.

Ulrich Matthias



Kjara (Chiara Raggi) dum la koncerto.

Eindrücke vom 99. Deutschen Esperanto-Kongress

Für mich war der 99. Germana Esperanto-Kongreso 2022 in Oldenburg der erste Esperantokongress, an dem ich teilgenommen habe.

Dabei habe ich vier zentrale Erkenntnisse gewonnen: Esperantisten sind aufgeschlossene Menschen, die wenig schlafen; es gibt immer Kekse und meine Begeisterung für die Bewegung ist noch größer geworden.

Aufgrund meines Alters habe ich schon im Vorfeld an den vierwöchigen Zoom-Treffen der mezaĝuloj teilgenommen und kannte daher schon ein paar Leute, aber noch wenige persönlich. Trotzdem habe ich mich sofort bei meiner Ankunft willkommen gefühlt. Dazu haben die vielen netten und geduldigen Gespräche beigetragen, die ich mit so vielen Menschen geführt habe.

Parallel zum offiziellen Programm des Kongresses gab es ein Programm für die mezaĝuloj, an dem ich sehr gerne teilgenommen habe und das zu meiner gesteigerten Begeisterung wesentlich beigetragen hat. Ich möchte hier nicht nochmal das

DER ESPERANTO-KO... ★★★★★



Saluton en Oldenburg! Herzlich Willkommen in Oldenburg! Ĉi tie okazis la 99-a (naŭdek...

👤 Einzel-Bound
🕒 Ca. 50 Minuten

🏷️ Lernen
📏 Ca. 3.5 Kilometer

gesamte Programm durchgehen, sondern nur die für mich wichtigsten Punkte. Die meisten Programmpunkte fanden zusammen mit dem parallel stattfindenden KEKSO statt. (Daher meine Erkenntnisse über die vielen Kekse.)

Besonders gut gefallen hat mir die Alternative zur Stadtführung, genannt Geokaŝado, eine Schnitzeljagd, die auf Esperanto übersetzt wurde.

An dieser Idee, der „modernen“ und spielerischen Form von Stadtführungen oder Spaziergängen mit kleinen Rätseln, setzt auch unser Projekt „Actionbound“ an. Dieses Projekt ist die Erstellung von Schnitzeljagden, sogenannten „Bounds“ für die App Actionbound, die mit dieser App spielbar sind. Während des Kongresses haben wir begonnen einen Bound für Oldenburg zu entwickeln

und für den nächsten Kongress in Braunschweig werden wir auch einen erstellen. Diese kleinen Stadtrundgänge führen den Spieler in Oldenburg auf den Spuren

des Kongresses an die unterschiedlichen Veranstaltungsorte. Dabei bekommt er grundlegende Informationen zu dem Kongress, lernt ein paar Worte auf Esperanto, bekommt historische Informationen über die Esperanto-Bewegung, die mit Quizfragen abgefragt werden und bekommt einen kurzen Text auf Esperanto vorgelesen. Unser Ziel ist so das Interesse zu wecken und unsere Begeisterung weiterzugeben. Daher wird der Bound für Braunschweig noch dieses Jahr veröffentlicht, um so Interesse für den Kongress im nächsten Jahr und für das Lernen von Esperanto zu wecken. Eine Kostprobe unseren Bounds für Oldenburg ist hier zu finden: „<https://actionbound.com/bound/beispieloldenburg>“

Und wenig schlafen? Naja, ich habe am gufujo teilgenommen und das erklärt sich ja schon von allein!? Vielen Dank für die gute Organisation und die Möglichkeit kreative Projekte zu bearbeiten.

Ina Sewald



Rekomenditaj ekskursoj dum la GEK en Brunsviko


En la apuda urbo Wolfsburg troviĝas ekde la jaro 2000 la tiel nomata „Aŭto-urbo“, kreita de la mondkonata aŭtofabriko Volkswagen (VW).

Temas pri grandega arealo, kies kerno estas la muzeo pri aŭtomobiloj, ne nur VW. Oni prezentas pli ol 250 aŭtojn de pli ol 60 fabrikmarkoj. Inter ili estas kopio de la unua aŭto, kiun konstruis Karl Benz en la jaro 1886, kaj la rara Bugatti Atlantic, de kiu ekzistas nur du ekzempleroj en la tuta mondo. Ĉiuj prezentataj veturiloj havis grandan influon pro ilia teknika aŭ dezajna konceptoj. La ekspozicio regule ŝanĝas la montratajn aŭtojn, ĉar ofte la aŭtoj partoprenas aranĝojn aŭ ekskursojn.

Krom la muzeo interesas la du turoj, 48 metrojn altaj, kiuj estas la simbolo de la aŭto-urbo. Ili servas kvazaŭ kiel bretaro por novaj aŭtoj, kiuj atendas sian transdonon al la kliento: Ĉirkaŭ 500 novaj aŭtoj estas transdonataj ĉiutage al la aĉetantoj. Kiam la kliento aperas je la fiksita dato, oni transportas la aŭton aŭtomate al la halo en la teretaĝo, fiksas la numerpladon, kaj la kliento veturas hejmen. Oni povas viziti la turojn.

Sed la „Aŭto-urbo“ ofertas pli ol nur aŭtoj: Ekzistas restoracioj, infanludejoj, vendejoj, aranĝoj kaj la „tunelo de aromoj“, kie oni povas priflari diversajn florojn. Entute vidinda celo! (Daŭrigota.)

Andreas Emmerich



Empfehlenswerte Ausflüge während des GEK in Braunschweig

In der Nachbarstadt Wolfsburg befindet sich seit dem Jahr 2000 die sogenannte „Autostadt“, angelegt von dem weltbekannten Autohersteller Volkswagen (VW).

Es handelt sich um ein sehr großes Gelände, dessen Zentrum ein Automuseum ist (nicht nur für VW). Es werden etwa 250 Autos von 60 verschiedenen


Marken gezeigt. Darunter ist ein Nachbau des ersten Automobils überhaupt, das im Jahr 1866 von Karl Benz gebaut wurde, und ein äußerst seltener Bugatti Atlantic, von dem überhaupt nur zwei Exemplare hergestellt wurden. Alle gezeigten Autos hatten großen Einfluss hinsichtlich ihrer technischen Konzeption oder ihres Designs. Die gezeigten Autos wechseln häufig, da viele regelmäßig an Veranstaltungen und Ausfahrten teilnehmen.

Außer dem Museum sind die zwei 48 m hohen Türme interessant, die als Wahrzeichen der Autostadt gelten. Sie dienen gewissermaßen als Auslieferungsregal für die Neuwagen, die auf ihre Übergabe an den Käufer warten. Wenn der Kunde zu seinem Termin erscheint, wird das neue Auto vollautomatisch ins Erdgeschoss transportiert, erhält sein Nummernschild, und der Kunde kann nach Hause fahren. Die Türme können besichtigt werden.

Aber die „Autostadt“ bietet nicht nur Autos: Es gibt Restaurants, Kinderspielplätze, Läden, Veranstaltungen und den „Dufttunnel“, wo man den Duft verschiedener Blumen erfahren kann. Insgesamt ein lohnendes Ziel!

(Wird fortgesetzt)

Andreas Emmerich



Deutscher Esperanto-Bund e.V.
Nils Brinkmann

05.06.2022

Protokoll der Bundesversammlung am 05.06.2022 in Oldenburg (Oldb)

Beginn der Bundesversammlung:
09.27 Uhr, Ende 11.58 Uhr

Anwesende Stimmberechtigte: 67. Virtuell, aber ohne Stimmrecht, nahmen zeitweilig bis zu elf Personen teil.

Vom Vorstand waren anwesend:

Ulrich Brandenburg, Barbara Brandenburg, Michaela Stegmaier, Andreas Emmerich, Dr. Matthias Hecking, Andreas Diemel, Franz Kruse; Michael Vrazitulis (für DEJ), Nils Brinkmann.

1. Eröffnung

a) Begrüßung

Der Bundesvorsitzende Ulrich Brandenburg begrüßt die Anwesenden und eröffnet die Versammlung. Er weist darauf hin, dass zur Erleichterung der Protokollführung die Versammlungssprache Deutsch ist.

b) Feststellung der Beschlussfähigkeit

Die Einladung zur Bundesversammlung vom 12.03.2022 wurde rechtzeitig mit der Verbandszeitschrift „Esperanto aktuell“ (02/2022, Nr. 272) verschickt. Damit ist die Versammlung, unabhängig von der Anzahl der Anwesenden, beschlussfähig.

c) Genehmigung der Tagesordnung

Die Tagesordnung wurde einstimmig angenommen.

d) Wahl des Protokollführers

Auf Vorschlag von Ulrich Brandenburg wird Nils Brinkman einstimmig zum Protokollführer gewählt.

e) Genehmigung des Protokolls der Bundesversammlung 2021 Osterode am Harz

Das genannte Protokoll wurde in der Ausgabe 06/2021 von „Esperanto aktuell“ veröffentlicht. Es wird bei einer Enthaltung genehmigt.

In einer Schweigeminute wird der Verstorbenen des letzten Jahres gedacht:

Wolfgang Bohr, Ursula Schrapp, Akiles Sanz, Klaus Leith, Dieter Dungere, Hartmut Mittag.

2. Berichte der Bundesorgane

a) Bericht des Vorstandes

Es wird auf den Vorstandsbericht (abgedruckt in „Esperanto aktuell“ Nr. 2/2022) durch den Vorsitzenden verwiesen.

Der Vorsitzende berichtet ergänzend über die Ereignisse seit der letzten Bundesversammlung seit Oktober 2021. Leider musste nun schon zum dritten Mal das PSI abgesagt werden, da es zu wenige Anmeldungen gab. Er appelliert an die Anwesenden, sich auch künftig für Veranstaltungen anzumelden. Sollte ein Treffen ausfallen, würde der vorab entrichtete Beitrag vollumfänglich erstattet.

Der Vorsitzende weist auf eine Festschrift zum 100. Jubiläum des Esperanto-Blindenverbandes EBLOGO hin und dankt den daran Beteiligten. Der Vorsitzende berichtet über die Schwierigkeiten, auswärtige Gäste, insbesondere aus Russland, einzuladen (Visumspflicht, Impfnachweis, „zwingende Notwendigkeit“).

Der Vorsitzende dankt den Organisatoren des letztjährigen virtuellen Kongresses, insbesondere den an der Technik Beteiligten. Ein weiterer Schwerpunkt war die Beteiligung an der „Zukunftskonferenz der EU“.

Bereich Verwaltung

Barbara Brandenburg (Verwaltung) berichtet darüber, dass ein Schwerpunkt die Aufarbeitung des Mitgliederdatenpools gewesen sei. Ferner schreite die Katalogisierung von Nachlässen weiter voran. Ortsgruppen mit eigenen Bibliotheken werden gebeten, ihre Bestände per Excel-Tabelle an die Geschäftsstelle weiterzuleiten, um diese in einer Zentraldatenbank zu veröffentlichen.

Bereich IT

Franz Kruse berichtet über seine Tätigkeit als IT- und Technikbeauftragter. Ein Schwerpunkt sei die regelmäßige Aktualisierung des Internetauftritts (Veranstaltungen, Pressearbeit, redaktionelle Überarbeitung). Ferner wurden die technischen Möglichkeiten erweitert, so z.B. bei Teilnehmerlisten. Außerdem wurden alle Jahrgänge ab 2011 von „Esperanto aktuell“ im Netz archiviert. Franz Kruse gibt gerne Hilfestellungen (Schulungen) für die dezentrale Pflege von Inhalten durch Ortsgruppen. Der Internetauftritt werde künftig verstärkt auch auf mobile Endgeräte ausgerichtet. Zoom-Konferenzen hätten im letzten Jahr stark zugenommen. Die Pflege von Informationskanälen durch die AG GEA.IT, die sich alle 14 Tage per Zoom trifft, sei ein weiterer Schwerpunkt.

Stellvertretender Vorsitz

Andreas Emmerich berichtet über seine Tätigkeit als stellv. Vorsitzender (s. auch: Vorstandsbericht in „Esperanto aktuell“ Nr. 2/2022). Ein Hauptaugenmerk liegt auf der Zusammensetzung eines künftigen Vorstands. Anwesende, die Interesse an der Vorstandsarbeit haben, können sich vertrauensvoll an Andreas Emmerich wenden. Er weist nochmals auf die Möglichkeit, den DEB durch Erbschaften zu begünstigen. Auch die FAME-Stiftung, die sich der Förderung von Esperanto-Kultur verschrieben hat, könne berücksichtigt werden. Er sei gerne beratend tätig, um Komplikationen im Nachgang einer Erbschaft zu vermeiden.

Vorstandsbereich Orts-, Landes- und Fachverbände (Untergliederungen)

Andreas Diemel (Untergliederungen) berichtet ergänzend zum Vorstandsbericht über einen Besuch bei der Ortsgruppe Nürnberg und weiteren Fachverbänden (KELI, EBLOGO, IFEF). Ziel seiner Arbeit sei es überdies, eine Art Netzwerk der Ortsgruppen zu bilden.

„Mittlere Generation“

Michaela Stegmaier (Mittlere Generation/GEA.juna) berichtet über vielfältigen Aufgaben in dem Bereich (s. auch Bericht in „Esperanto aktuell“ Nr. 2/2022).

Deutsche Esperanto-Jugend (DEJ):

Michael Vrazitulis

Michael Vrazitulis berichtet über die nach der Pandemie wieder auflebende Treffenskultur der DEJ (u.a. Wochentreffen in Halbe, KEKSO Oldenburg) sowie zum Stand der Mitgliederwerbung. Michaela Stegmaier (DEJ) berichtet ergänzend, dass gleichwohl viele Veranstaltungen der Esperanto-Jugend derzeit noch online stattfinden müssten. Es sei aber gelungen, u. a. über Online-Seminare Interessenten für einen künftigen Vorstand zu gewinnen.

Presse- und Öffentlichkeitsarbeit

Lu von Wunsch-Rolshoven erläutert die unter Punkt 7.6 („Presse- und Öffentlichkeitsarbeit“) gemachten Ausführungen im Vorstandsbericht, in denen es primär darum geht, Vorurteile und Falschbehauptungen durch Sprachwissenschaftler und Journalisten zu entkräften bzw. aufzuklären.

2 b) Bericht des Schatzmeisters

Dr. Matthias Hecking erläutert seinen Kassenbericht, der unter dem Titel: „Auch der Jahresabschluss 2021 zeigt ein positives Ergebnis“, der in „Esperanto aktuell“ Nr. 2/2022, ab S. 15) abgedruckt ist. Wie dort dargelegt, zeigt auch der Jahresabschluss 2021 ein positives Ergebnis (+ 60.000 Euro). Die Budget-Ansätze wurden weitestgehend eingehalten bzw. übertroffen. Alle Veranstaltungen haben positiv oder mit einem sehr kleinen Minus abgeschlossen. Als zusätzliche Einnahmequelle konnten zwei EU-Förderungen aus dem Programm „Erasmus+“ erschlossen werden. Die Erasmus+-Zuschüsse sind der Hauptgrund für das große positive

Jahresergebnis. Diesen hohen Erasmus+-Einzahlungen werden hohe Auszahlungen bis Frühjahr 2023 gegenüberstehen. Für 2022 ist mit einem negativen Jahresabschluss zu rechnen. Dr. Hecking bittet die Mitglieder ferner, Änderungen bei der Bankverbindung zeitnah mitzuteilen bzw. den Zahlungszweck korrekt anzugeben

2 c) Bericht der Rechnungsprüfer

Auf nicht im Netz erschienene Berichte, die aber vorliegen, wird hingewiesen. Diese können Interessenten gerne als Kopie zum persönlichen Gebrauch (nur per Netzpost) zugesandt werden. Anfragen an "medienecho@esperanto.de" - Bitte den jeweils genannten Betreff angeben.

Danke

19. September 2022

Die Bremer Stadtmusikanten auf Esperanto

<https://www.tamakai-books.de/de/Zu-guter-Letzt/die-bremer-stadtmusikanten-esperanto-ausgabe.html>



19. September 2022

Ö1 ORF

Sprachliches Hoffnungsfeld Esperanto

Zur Geschichte der internationalen Plansprache

<https://oe1.orf.at/>

[programm/20220919/693761/Sprachliches-Hoffnungsfeld-Esperanto](https://www.oe1.orf.at/programm/20220919/693761/Sprachliches-Hoffnungsfeld-Esperanto)

weitere Sendetermine

<https://oe1.orf.at/suche?query=esperanto>



13. September

SALUTON

Eine Bekleidungsfirma hat eine originelle Idee

<https://www.pinterest.de/pin/saluton-hello-in-esperanto-retro-text-pullover-hoodie-t-shirt-sweatshirt-tank-top-racerback-dolman-in-2022--878976052247207516/>

[in-2022--878976052247207516/](https://www.pinterest.de/pin/saluton-hello-in-esperanto-retro-text-pullover-hoodie-t-shirt-sweatshirt-tank-top-racerback-dolman-in-2022--878976052247207516/)



12. September

Berliner Woche

„Wir machen Völkerverständigung“

Michael Vrazitulis ist Vorsitzender der Deutschen Esperantojugend und setzt sich für Sprachgerechtigkeit ein.

Der eigentliche Zeitungsartikel ist

auf der Netzseite leicht und klar vergrößerbar.

<https://esperanto.berlin/de/berliner-woche-36-2022/>

https://www.berliner-woche.de/kreuzberg/c-bildung/michael-vrazitulis-ist-vorsitzender-der-deutschen-esperanto-jugend_a356852



21. August 2022

San Hejmo Festival kehrt 2023 an zwei Tagen zurück

Weeze - Gänsehaut! Der Auftakt am Airport Weeze ist sensationell geglückt. Die mitreißenden Live-Auftritte begeisterten. Vom 18. bis 20. August 2023 kehrt San Hejmo als

Wochenend-Festival mit zwei Showtagen und Camping zurück.

http://www.en-a.de/kunst_kultur_und_musik/san_hejmo_festival_kehrt_2023_an_zwei_tagen_zurueck-84606/

<https://lokalclick.eu/2022/08/21/san-hejmo-festival-feiert-umjubelte-premiere/>



19. August 2022

Über Arthur Bauer

* 19. Februar 1915 in Zürich; † 17. September 2010 in Männedorf war ein Schweizer Journalist und Philologe, der mehrere populäre Publikationen zu Schweizerdeutsch, Rätoromanisch und Esperanto verfasste.

https://dewiki.de/Lexikon/Arthur_Baur#Esperanto

14. August 2022

Volkshochschule Arnberg/Sundern

Die VHS in Sundern-Langscheid veröffentlichen ihre Termine.

U. a. finden sich die Daten für das bekannte und erfolgreiche Esperanto-Intensiv-Wochenende im



November

<https://www.vhs-arnsberg-sundern.de/programm/fremdsprachen/kurs/Esperanto-Intensivwochende-fuer-Fortgeschrittene/X-426-190?Fsize=0%22%22>



26. Juli 2022

Bona Volo

Paiva Neto: Espero neniam mortas

Für jeden, der mitten in den Problemen des täglichen Lebens Trost für die Seele sucht, sowie Stärkung und Vitalität, um die zahlreichen Herausforderungen zu

meistern, ist dieses Werk ein guter Begleiter.

https://play.google.com/store/books/details/Paiva_Netto_Espero_neniam_mortas?id=_Xh8EAAAQBAJ

26. Juli 2022

Belgieninfo

Auf den Spuren von und rings um Neutral-Moresnet

Von Michael Stabenow

Wer auf der Autobahn E40 nach Deutschland fährt, lässt diesen Flecken in der Regel meist

links liegen. Dabei lohnt sich ein Abstecher nach Kelmis, mit rund 11000 Einwohnern

zweitgrößte Gemeinde im deutschsprachigen Ostbelgien. Das „Museum Vieille Montagne“ lässt Besucher in die Geschichte des einst größten Zinkabbaugebiets Europas und des ein Jahrhundert lang bestehenden und über einen Sonderstatus verfügenden Mini-Staat „Neutral-Moresnet“ abtauchen.

<https://www.belgieninfo.net/auf-den-spuren-von-und-rings-um-neutral-moresnet/>



26. Juli 2022

Basellandschaftliche Zeitung

Auf eine Tasse Esperanto

Denkwürdige Feiertage gibt es zuhause. Heute beschäftigen wir uns mit der Völkerverständigung.

[https://qoshe.com/basellandschaftliche-zeitung/hannes-](https://qoshe.com/basellandschaftliche-zeitung/hannes-nusseler/auf-eine-tasse-esperanto/143130125)

[nusseler/auf-eine-tasse-esperanto/143130125](https://qoshe.com/basellandschaftliche-zeitung/hannes-nusseler/auf-eine-tasse-esperanto/143130125)

bz Basel

zum selben Thema

<https://www.bzbasel.ch/kultur/basel/das-wort-zum-tag-auf-eine-tasse-esperanto-ld.2318468>



23. Juli 2022

Player.fm/Ö1 Wissen aktuell

Über Gletscherschmelze und einen Besuch im Esperanto-



Museum in Wien

<https://player.fm/series/1-wissen-aktuell/gletscher-schmelzen-besonders-schnell-besuch-im-esperanto-museum>

Kalendario 2022

(daŭrigo el la paĝo 14)

10.02.23 – 12.02.23 Esperanto-Wochenendkurse

03.03.23 – 05.03.23 DEB-Wochenend-Weiterbildungsseminar

14.04.23 – 16.04.23 Esperanto-Wochenendkurse

22.05. – 26.05.23 Antaŭkongreso kun vizitoj de la Esperanto-urbo Herzberg kaj ĉirkaŭaĵo

26.05. – 29.05.23 100. Deutscher Esperanto-Kongress in Braunschweig

28.05.23 Nachmittags Esperanto-Beteiligung beim Festumzug des Herzberger Volks- & Schützenfestes

02.06.23 – 04.06.23 DEB-Wochenend-Weiterbildungsseminar

Juli 2023 **07.07.23 – 23.07.23** Esperanto-Sommerkurse im Esperanto-Centro Herzberg



Welt der Bücher und Zeitschriften – Esperanto und andere Plansprachen

Aktuelles, Wissens- und Bedenkenswertes aus der Deutschen Esperanto-Bibliothek Aalen

Folge 67 – *neniam plu!* – *nie wieder!*?

Das „nie wieder!“ nach dem 2. Weltkrieg war ja nicht gerade ein essenzieller Teil meiner Jugend in den 50er und 60er Jahren, einer Zeit, in der viele Beamte aus der unseligen Vorkriegszeit einfacher weiter oder wieder als Staatsdiener tätig waren. Im Rückblick muss man sich wundern, wie blauäugig und unkritisch man sich da gab.

Erst ein intensiver Besuch der Jerusalemer Gedenkstätte *Yad Vashem* (Hand und Name, Gedenkstätte der Märtyrer und Helden des Staates Israel im Holocaust) motivierte zu einem nachhaltigeren Überdenken unserer Geschichte, die ich als Nachgeborener ja nicht mitzuverantworten hatte, wie ich dachte.

Im Nachgang dazu hinterließen auch virtuelle Besuche in unserem Bundestag¹ ihre tiefen Eindrücke. Soweit, so gut: nie wieder Krieg, kein Antisemitismus, kein Rassenhass mehr!

Was mich an der Nazizeit ja viel mehr aufregte (und ich habe dazu ausführlich schon hier im Heft geschrieben – es ist zwar lange her², und doch noch wie gerade erst formuliert in der Erinnerung), das waren die Bücherverbrennungen.

Man ist geneigt zu denken: das ist kaum noch so aktuell, dass man es thematisieren soll und muss. Wirklich? „woke“ ist nun mal nicht „en vogue“ (esti vekite atenta ne estas avangarda trajto) – zumindest nicht (mehr) in Europa.

Und doch ist das Phänomen nichts Neues, sondern entstammt dem afroamerikanischen Englisch der 30er Jahre, als das Bewusstsein für mangelnde soziale Gerechtigkeit erwachte. Neu aufgeflammt ist es (leider) durch die Todesfälle farbiger Bürger in den USA, seit 2014. Man kennt es besser unter dem Schlagwort „black lives matter“.

Wenn mir da Heines alte Warnung „*dort wo man Bücher verbrennt, verbrennt man auch am Ende Menschen*“ wieder in den Sinn kommt, ist dies kein Zufall, auch wenn entsprechende Vorfälle nicht öffentlich breit getreten werden.

Indizien könnten etwa sein, dass aus immer mehr Bibliotheken immer mehr Titel verschwinden; dass man Shakespeares „Sommertraum“ klassistische Inhalt vorwirft oder Strindbergs „Fräulein Julie“ aus Leselisten eliminiert, weil es von Selbstmord handle. Wer mehr Information dazu sucht, der informiere sich über die cancel-culture an britischen Universitäten!

In der österreichischen Tageszeitung *Standard* las man am 23.8.22: *Im Juni ließ die Autorin Margaret Atwood eine feuerfeste Version ihres Bestsellers „Der Report der Magd“*

(1985) versteigern, um auf die grassierende „Zensur“ literarischer Werke in den USA aufmerksam zu machen.

Auch eine Auszeichnung schützt da nicht, Kanonisierung ebenso wenig, und Faktizität hilft auch nicht, wenn eine Abstrafung droht.



Das zeigte sich Anfang dieses Jahres an dem Comic „Die vollständige Maus“ von Art Spiegelman, der ja 1992 als erster Comic-Autor dafür einen Pulitzer-Preis³ erhalten hatte.

Ganz kurz zum Inhalt:

Dieser Comic erzählt vom Leben des Vaters Wladek Spiegelman, der ein polnischer Jude war. Er ist in schwarz-weiß gehalten und als Fabel gestaltet. Jede Gruppe wird durch ein Tier repräsentiert:

Katzen stellen die Nazis, Mäuse die Juden, Schweine die Polen⁴, Frösche die Franzosen, Rentiere die Schweden, Fische die Briten und Hunde die Amerikaner dar.

Art(hur) besucht seinen Vater Wladek, um mehr über Holocaust und Auschwitz zu erfahren.

Und Wladek berichtet seinem Sohn vom deutschen Einmarsch und deren Sieg, auch von den Untaten gegenüber den dortigen Juden. Nachdem er und seine Familie alles verloren und einige Fluchten überwunden hatten, kamen sie schließlich doch in ein Konzentrationslager.

Dann geschieht es eines Tages: Wladek und seine Frau Anja werden nach Auschwitz deportiert. „*Von da*“, so wissen sie, „*kommt man nur durch den Schornstein wieder hinaus*“. Doch kurz bevor sich das schreckliche Schicksal für Wladek und Anja in Auschwitz erfüllt, werden sie durch die Alliierten gerettet.

Die Tragik zeigt sich dann am Ende der Geschichte: der Vater hatte die Tagebücher der Mutter verbrannt, obwohl sie doch noch davon gesagt hatte, sie wünsche sich, dass ihr Sohn sie eines Tages lesen möge.

¹ Empfehlungen zu Netzadressen auf t1p.de/reitligrekommendoj

² es war in der №3 von Esperanto aktuell 2013: esperanto-aalen.de/biblioteko/WdBuZ/Folge_Buecher_verbrennen.html, espib.bplaced.net/aldonoj/brulantaj_libroj/Brennende_Buecher_UM.pdf

³ Spiegelman, Jizchak Avraham ben Ze'ev *1948 – <https://www.pulitzer.org/prize-winners-by-category/260>

⁴ was zu Verbrennungen des Buches in Polen führte

Und der Vater selbst gesteht es dann ein: „es ist eine Schande!“

Abschließend nennt der Sohn sogar seinen Vater Mörder.

Mich hat dieser Comic sehr



berührt, und gewiss wäre er es wert, auch in Esperanto gelesen zu werden, so in einer Art Gegen-Aktion! Im Moment kenne ich jedoch keinen, der dies unternehmen möchte, leider (ich bin kein angloföner Muttersprachler...).

Die Reaktionen einzelner Polen mag man belächeln, wohl nicht so recht die deutscher Behörden: Ein 1990 für den Comic-Salon Erlangen hergestelltes Plakat für „Maus – Die Geschichte eines Überlebenden“ wurde 1995 wegen angeblicher Nazi-

Propaganda beschlagnahmt (Verwenden von Kennzeichen verfassungswidriger Organisationen, § 86a StGB).

Das warf die Frage auf: „Darf Holocaust im Comic verarbeitet werden?“, die man zunächst so beantworten wollte: „dies sei nicht möglich, reiche nicht an den realen Schrecken des Holocaust heran und sei somit notwendigerweise stets verharmlosend und trivialisierend“, so lautete der zentrale Vorwurf.

Erst am 5. April 2001 endete vor dem Landgericht Meinungen das über sechs Jahre dauernde „Meininger Zensur-Verfahren“; der Verlag akzeptierte einen Vergleich samt Geldbuße von 15.000 DM, aber „gleichwohl stehen wir vor den Trümmern unserer Arbeit. Mit Gerechtigkeit hat das alles wenig bis gar nichts zu tun“.

Heute liest man bei der Bundeszentrale für politische Bildung: „Das Genre des Holocaustcomics kann einen Beitrag zur historischen und gesellschaftspolitischen Erinnerungsarbeit leisten. Die spezifischen, mehrdimensionalen Möglichkeiten der Bildgeschichte nutzend, ist der Comic durch die ihm eigene Erzählstrategie der Gleichzeitigkeit in der Lage, Vergangenheit, Gegenwart und Zukunft nach Belieben zu vereinen und dadurch eine besondere Perspektive zu bieten. Raum und Zeit sind für die Gattung des grafischen Erzählens jederzeit überwindbare Hürden – wie gerade „Maus“ belegt, wo der Autor häufig zwischen der Vergangenheit (den Erzählungen des Vaters über seine Erlebnisse während der Shoah) und der Gegenwart (dem Vater-Sohn-Konflikt) hin und her wechselt – und sich mit der Verarbeitung der Zweifel an seinem Projekt zugleich Metafragen gestattet, die in die Zukunft reichen.“

Weiter: „Holocaustcomics stellen einen wichtigen Bestandteil moderner Erinnerungsarbeit und Medienpädagogik dar: Gerade für Kinder und Jugendliche



eignen sie sich als Zugang zum Thema der Shoah. Insbesondere biografische Holocaustcomics vermögen Saul Friedländers Credo „Gebt der Erinnerung einen Namen“ zu verwirklichen.“

Und was hatten die Zensuristen im Jahre 2022 zu bemängeln? Eine Schulbehörde im Bundesstaat Tennessee ließ ihn aus Bibliotheken verschwinden, der Grund: „wegen seiner anstößigen Sprache“, z.B. Schimpfwörter wie „God Damn“ (verdamm) oder das Bild einer nackten Toten.

Leider ist dieser Trend wieder nach Europa zurückgekommen: auf der britischen Insel bekennen sich Universitäten dazu, herausfordernde Inhalte zu vermeiden, um ihre Studierenden zu schützen. 1081 Texte wurden in vielen Studiengängen mit sog. Trigger-Warnungen versehen oder gar von Pflichtlektüre zu optionaler herab gestuft. Mindestens 10 Institutionen haben Bücher zu Themen wie Sklaverei oder Suizid aus Leselisten entfernt.

Anfangs hatte ich beispielhaft ein paar Indizien aufgeführt, für eine Gefährdung, die unserer klassischen Literatur drohe. Ich möchte hier ein paar weitere nennen:

In Bordeaux durfte eine Philosophin nicht gegen die Leihmutterchaft argumentieren, weil das homophob sei. Wegen Islamophobie und Rassismus wurde an der Sorbonne ein Seminar über die „Anzeichen von Radikalisierung“ und die Aufführung eines Stücks von Aischylos mit schwarzgeschminkten Darstellern verboten.

Eine Oxford-Dozentin berichtete, ihre Studierenden möchten gewarnt werden, „wenn eine Stelle naht, die irgendetwas in ihnen anrichten könnte“, zum Beispiel die Vergewaltigung Lavinias in Shakespeares „Titus Andronicus“. Auch Dickens steht auf diesen Listen.

2019 wehrte sich eine österreichische Hochschule gegen den Auftritt der Feministin Alice Schwarzer und schrieb ihr "antimuslimischen Rassismus" zu: Schwarzer habe sich mehrfach „sexarbeitsfeindlich, transphob und antimuslimisch-rassistisch geäußert“.

Und ganz pervers wird es meiner Ansicht nach, wenn damit argumentiert, man müsse seine „Rolle als Bildungseinrichtung ernst nehmen“ (indem man kontroverse Positionen vermeidet, etwa durch Zensieren und Verbote?).

So werden neuerdings auch Werke von Jane Austen, Charlotte Brontë und Agatha Christie mit der Warnung versehen, dass Leser sich vom Inhalt gestört fühlen könnten: wegen Sexismus, Rassismus oder Tierleid.

Derlei Eingriffe in die Literatur zeigen bereits weitreichende Folgen. Eine Umfrage unter britischen Studenten ergab, dass sie heute weniger tolerant gegenüber anderen Meinungen sind als noch vor sechs Jahren. Einschränkungen der freien Rede werden häufiger befürwortet.

Dieses „hochbedenkliche, sich selbst verstärkende System“ ist eine Entwicklung, vor der man nicht genug warnen kann, so zumindest meine Einschätzung.

Comics dürfen auch spannend und unterhaltsam sein, sollen laut Kunstdidaktiker Dietrich Grünewald aber auch schockieren: „Es ist richtig und nötig, der jungen Zielgruppe Historie zuzumuten“. Solange eine Bildergeschichte die Anbindung an die Realität klar macht und die Leserschaft in der Position eines „Nie wieder“ bestärkt, helfen diese Bilder.

Utho Maier

Enkonduke

Michael Vrazitulis

Saluton salaton! En la eldono de ·kune·, kiun vi ĝuste nun tenas en la mano, atendas vin la solena invito al nia sekva membroasembleo, kiu okazos plej fine de tiu ĉi jaro.

Tie, ni interalie elektos novan estraron por la mandato 2023–2024. Kaj ni bezonas vin! Jes, ĝuste, vin! Ne rigardu for de la gazeto, vi jam bone legis. Ni bezonas vin, kara membro de Germana Esperanto-Junularo, por aliĝi al la nova teamo, kiu gvidos nian asocion dum la sekvaj du jaroj. Ĉu vi estas ideoplena aŭ agadema, politikema aŭ klaĉema, talenta aŭ kreema? Aŭ ĉu vi simple

interesiĝas pri la ĝenerala sperto de kunlaboro en estraro de junulara asocio, el kiu vi povos lerni multajn utilaĵojn aplikeblajn ankaŭ en via profesia vivo kaj kiu cetere sufiĉe plibeligos vian vivresumon? Tiam do ne hezitu kandidatiĝi kiel GEJ-estrarano! ;)

Tiu ĉi somero estis granda festo por junaj esperantistoj. Fine post du pezaj pandemiaj jaroj, ni denove povis renkontiĝi ĉe la plej granda, malaĉega evento de la jaro: La Internacia Junulara Kongreso en Nederlando! Kelkajn impresojn de tiu evento vi same trovos en tiu ĉi eldono. Ankaŭ ne maltrafu la artikolon de Paula pri ŝia sperto kiel infano, kiu kreskis en parte Esperanta familio. Sekvas raporto pri nia antaŭ nelonge okazinta 2-a GEJ-Semajnfino en Braunschweig. Fine, vi povos legi la duan parton de la fikcia rakonto „La malklara akvo“, kies komencon vi espereble jam trovis en la antaŭa, aŭgusta eldono de ·kune· (ene de Esperanto aktuell n-ro 274).

Via ·kune·-redakcio



Standoj de la franca kaj germana landaj sekcioj de TEJO ĉe la Junulara Movada Foiro.

Einladung zur DEJ-Mitgliederversammlung 2022

Deutsche Esperanto-Jugend e. V.
Katzbachstraße 25
10965 Berlin

Hamburg, den 16.09.2022

Hallo liebes Mitglied,

hiermit möchten wir dich ganz herzlich einladen zur Mitgliederversammlung der Deutschen Esperanto-Jugend e. V.

Diese findet am 30.12.2022 um 11:00 Uhr sowohl online unter <https://meet.jit.si/DEJMV2022> als auch im Freizeit- und Gästehaus am Wald (Weg zum See 4, 16775 Löwenberger Land) im Rahmen der Veranstaltung JES 2022/'23 (mehr Infos unter <https://jes.pej.pl>) statt, also hybrid.

Dabei erwarten dich die folgenden spannenden Punkte:

TOP 1: Eröffnung; Wahl von Versammlungsleitung, Wahlleitung und Protokollführung; Feststellung der Stimmberechtigung; Ergänzungswahl

TOP 2: Abstimmung über die Tagesordnung

TOP 3: Vorstands- und Kassenbericht mit anschließender Diskussion

TOP 4: Bericht der Kassenprüfer:innen

TOP 5: Entlastung des Bundesvorstandes

TOP 6: Wahl des Bundesvorstandes und der Kassenprüfer:innen

TOP 7: Bericht der Arbeitsgruppen

TOP 8: Arbeitsplan und Haushalt für das kommende Jahr, Wahl von Ausschüssen

TOP 9: Verschiedenes

TOP 10: Entscheidung über Ort und Datum der nächsten Mitgliederversammlung

TOP 11: Schließung der Sitzung

Wenn du aktiv werden willst um im Verein etwas zu bewegen, werde Mitglied eines Ausschusses, der dein Interessengebiet vertritt (TOP 8).

Oder hast du Lust, den Vorstand gewählt zu werden (TOP 6), weißt aber nicht, was da so auf dich zukommt? Kein Problem, melde dich einfach bei Michael (michael.vrazitulis@esperanto.de) oder Michaela (michaela.stegmaier@esperanto.de), um mehr zu erfahren.

Es freuen sich auf dich **Michael, Michaela und Jan**

Impresoj de Internacia Junulara Kongreso 2022 en Nederlando

Michaela Stegmaier

Finfine denove iu granda ĉeesta junulara aranĝo! Por mi estis la unua IJK post Badaĥoso 2018 kaj la unua granda evento post JES 2018/'19 en Hirŝluĥ. Pro finstudado kaj familiaj kialoj kaj poste pro la pandemio mi havis pli longan paŭzon, ol mi povis imagi! Des pli agrable kaj ĝojige estis la reveno al Esperantujo. Tiom longe mi sopiris la revidon de amikoj kaj la ekkonon de ĉiuj, kiuj en tempoj de la pandemio eklernis nian komunan lingvon! Sennombraj retaj kunvenoj, GEJ-seminarioj, ludoalvokoj, reta 70-jariĝo de GEJ kaj poste la novaj mezaĝulaj rondoj, sed ankaŭ KEKSOj, GEJ-Semajnfino kaj la Germana Esperanto-Kongreso okazis intertempe kaj estis plezurigaj spertoj. Sed ili ne konkurencas kun IJK. Kia festo!

Kaj kia muzikalo! Jam de monatoj mi zumas la melodiojn de la muzikalaj kantoj. Pli precize ekde majo, kiam mi kandidatiĝis por rolludi kaj kanti en tiu moJosega projekto! Sed ekde IJK, kaj specife ekde la prezento de „June kaj kune“, kiam ĉiuj IJK-anoj ekkonis ĉion, ne volas ĉesi veni al mia kapo la tekstoj de la

kantoj kaj centoj da citaĵoj el la skripto! Mi preskaŭ nur plu komunikas per citaĵoj, almenaŭ sentiĝas tiel. Do mi kredas, ke mi ne plu devas multe priskribi, kiom mi ŝatis la sperton esti parto de la surscenejigo kaj de la grupo de talentegaj homoj, kiuj koncipis kaj realigis ĉi Muzikalon.

Krome en IJK mi havis propran projekton, kiu estis kolekti subskribojn sur mia ĉemizo. Tiel mi parolis kun nekonatuloj kaj amikoj kaj ekhavis belan memoraron. Kaj kompreneble mi partoprenis en la gravaj programeroj de la kongreso: la Junulara Movada Foiro, trinkomanĝa nokto, diskejoj, koncertoj, ekskursoj kaj internacia vespero. Tempo por ĝui la lagon de la ejo preskaŭ nur restis dum la noktoj, sed tio kompreneble ankaŭ amuzas, multe pli ol dormi. Preskaŭ tradicie mi ne dormis dum la lasta nokto. Sed revenante hejme mi dormis dum 15 horoj senĉese. Kaj mi jam aliĝis al GEJ-Semajnfino, KEKSO, KKPS kaj JES!



Viktoria Schmidbauer

La IJK ĉi-aŭguste en Nederlando estis la unua granda Esperanto-aranĝo, en kiu mi partoprenis. Antaŭe mi jam foje renkontiĝis kun esperantistoj, sed neniam spertis unusemajnan nuran uzadon de tiu lingvo, kiun mi longe nur sole lernis. Precipe ĉar la kongresejo estis izolita en la mezo de nenio sentebliis vera Esperantuja etoso.

Mi partoprenis en TEJO-trejnado pri lingvoj kaj demokratio, kiu okazis dum la IJK. Pro la seminario mi havis malmultan liberan tempon por ĉeesti la aliajn proponitajn programerojn, aliflanke mi povis profiti de interesaj prelegoj, diskutoj kaj taskoj ĉirkaŭ lingvaj rajtoj, kiuj sume inspiris min pri plua aktivado por Esperanto. Kune kun niaj tri trejnistoj ni pasigis agrablan trejnadon – kvankam ne estis tute trankvile en nia kursejo, ĉefe pro ĉiutagaj provoj de la muzikalo, kies spektaklo dum la lasta vespero impresis kaj amuzis min. Mi ankaŭ ĉeestis aliajn vesperajn okazaĵojn, dancis La Bambon en la diskejoj, naĝis en la lago de la kongresejo, manĝis arakidan ŝmirajon sur mola pano kiel vespermanĝo, partoprenis en taga ekskurso al Antverpeno, ludis ludojn kaj konversaciis kun tiom da interesaj homoj, kiujn mi nur ekkonis tie.

Entute, la IJK estis sukceso por mi, kaj mi antaŭĝojas venontajn aranĝojn kaj trejnadojn.

Inès Kahin


Kia bela aranĝo! Post pli ol du jaroj en la movado, mi partoprenis por la unua fojo en la IJK. Novulo mi tute ne estas post volontulado en la Esperanto-Kultur-Centro de Tuluzo kaj mandato kiel vicprezidanto de TEJO, sed IJK ja havas apartan etoson, kiun mi vere ĝojis sperti.

Inter kunsidoj mi havis tempon renkonti karajn homojn, kiujn mi esperas revidi en aliaj renkontiĝoj. Aparte mi ŝatis la naturon en la IJK-ejo. Mi loĝas en urbocentro, do belis iri naĝi en la lageto posttagmeze kaj preni tempon por



trankvile legi surherbeje. Mi ankaŭ tre ŝatis la ludadon de „ultimate“-flugdisko! Aldone, ĉiuvespere estis proponita nova temo en la diskejo. Mi do multe dancis!

Do, vi certe vidos min en la sekva!




Utku Özdemir

Jen tri fotoj, kiujn mi faris dum la Antverpena ekskurso (maldekstre sube kaj dekstre supre).

Paula Weil

Ankaŭ mi ŝatus kundividi kelkajn fotojn: La unua foto montras nian rezulton de la „klimata mozaiko“, kiun mi gvidis. La dua estas dum la bicikla ekskurso al Tilburg, la tria estas ĉe la koncerto de Tim Gallego. Kaj fine, la lasta estas de mia prelego pri klimata justeco:



Ostereiersuche, Mazi und alle Jahre wieder ein bisschen Esperanto

Paula Weil



Bei Kindern sehr beliebt: Der als Cartoon-Serie verpackte Esperanto-Sprachkurs Mazi en Gondolando.

Warum Menschen anfangen, Esperanto zu sprechen, hat ganz unterschiedliche Gründe. Die einen sind total sprachenbegeistert, Esperanto ist nur die Kirsche auf dem polygoten Kuchen. Die anderen haben Lust, Menschen aus anderen Ländern zu treffen, aber keine Lust, viele Sprachen zu lernen. Ein paar landen irgendwie zufällig in Esperantujo und einige sind Denaskuloj.

Ich habe Esperanto gelernt, weil meine Mutter mit meinem Vater und mir alle Jahre wieder zur PSI (Printempa Semajno Internacia) gefahren ist. Seit ich eins bin oder so war ich eine Woche im Jahr beim Esperantotreffen, später waren es dann zwei.

Esperanto sprechen konnte nur meine Mutter, mein Vater und ich lange so gut wie nicht, gaaaanz langsam, Stück für Stück wurde es mehr mit den Jahren. Zum Esperantotreffen zu fahren hat mir aber trotzdem immer sehr gut gefallen. Beim PSI waren immer viele Kinder zum Spielen da, vormittags war Mazi-Kurs und Basteln, nachmittags Ausflüge und abends Konzerte, Puppentheater und Internacia Vespero. Dass ich nicht so viel verstanden habe, fand ich glaub ich nicht so schlimm, meine Mutter oder welche von den esperantosprechenden Kindern haben auch mal was erklärt.

Die Atmosphäre, die Menschen und das Programm haben mir immer sehr gut gefallen. Irgendwann kam dann der Punkt, wo ich dachte, entweder ich lerne jetzt Esperanto oder ich verstehe halt weiterhin nicht viel. So hab ich mich dann entschieden, „richtig“ Esperanto zu lernen.

Der alljährliche Mazi-Kurs wurde zum Esperantokurs für „die Großen“. Krokodili bei Treffen wurde weniger, Duolingo kam auch außerhalb der Treffen dazu, ich hab angefangen, Vorträge zu halten und einen tollen Online-Kurs von Heinz-Wilhelm Sprick hab ich auch noch gemacht. Nach der Corona-Pause der Vorort-Treffen ging es dann dieses Jahr auch endlich zu meinem ersten KEKSO und meinem ersten IJK in Präsenz. Ganz bestimmt waren das nicht meine letzten Jugendtreffen ohne Eltern. Darüber, so zu Esperanto gekommen zu sein, bin ich sehr froh. Esperantujo war immer ein Teil von meinem Leben und wird es wohl auch erstmal bleiben, dafür möchte ich danke sagen :)

Raporto de la 2-a GEJ-Semajnfino en Brunsviko

Jonas Schulz

Dum pluvema malvarma semajnfino (la 16-a ĝis la 18-a de septembro) ni renkontiĝis en Brunsviko por la dua GEJ-Semajnfino. Bedaŭrinde ne ĉiuj aligintoj povis partopreni, pro KOVIM-19. Pro tio ni estis kvarope. Ni uzis la tempon en Brunsviko por daŭrigi la revizion de la lingvokurso KEK, kiu nun estas ĝisdatigita kaj havas novajn registraĵojn.



Partoprenantoj de la 2-a GEJ-Semajnfino en Brunsviko.

Krom tia laboro ni multe babilis kaj parolis pri diversaj temoj, ekzemple pri la estontenco de la estraro de GEJ. Brunsviko estis bonega loko por GEJ-Semajnfino, ĉar ĉi tie okazos KEKSO de la 26-a ĝis la 29-a de majo 2023 – ĉu vi jam aliĝis? Ni vizitis la belegan KEKSejon, kiu – almenaŭ laŭ mia scio – estas la plej granda KEKSejo ĉiam ajn. Ni certe havos sufiĉe da spaco por ĉiuj. La KEKSO okazos samtempe kun la 100-a Germana Esperanto-Kongreso en Brunsviko, kiu enhavos ekskurson kun profesia Esperanta Brunsvik-ĉicerono, kiun ni jam povis elprovi dum la semajnfino.

Dum niaj aktivaĵoj en la urbo ni kreis kaj distribuis kelkajn varbadojn por GEJ kaj ĝiaj renkontiĝoj. Post la semajnfino en Brunsviko mi jam antaŭĝojas la venontjaran kongreson kaj mi konsilus al ĉiuj aliĝi.



Mandeseĝnitaj ŝtonaj varbadoj.

Rakonto (parto 2/2): La malklara akvo

Jorgos Vrazitulis

Tradukita el la greka
kaj komentita de Michael Vrazitulis

Jen la dua kaj la fina parto de la fikcia rakonto „La malklara akvo“, kiun, kiun mi tradukis por vi al Esperanto. Mi esperas, ke vi ĝuos ĝin. Se vi ankoraŭ ne legis la unuan parton, mi rekomendas, ke vi retrovu vian ekzempleron de la antaŭa eldono de ·kune· kaj legu ĝin tie (EA n-ro 274, paĝoj 29–31). Tamen, kaze ke vi ne plu havas ĝin, mi ja



Mapo, montranta la geografian distribuon de la diversaj latinidlingvaj grupoj sur la Balkana duoninsulo. Ruĝe markitaj estas regionoj de arumanoj (aŭ kiel en tiu ĉi rakonto: valahoj).

Fonto: commons.wikimedia.org/wiki/File:Map-balkans-vlachs.png

povas doni al vi skizan resumon de tio, kio okazis ĝis nun, por ke vi komprenu la kuntekston:

Komence de la rakonto, mezaĝa viro kun la nomo Jannis Mesjos, grekdevena, sed de multaj jaroj loĝanta en Germanio, tre maltrankviliĝas, kiam li ekscias, ke dum nokto kun eksterordinara pluvego lia demenca patrino Vangjo malaperis el sia pensiulejo. Feliĉe, du policanoj trovas ŝin staranta sur ponto super iu rivero kaj portas ŝin al lia hejmo. La maljunulino Vangjo ŝajnas tre konfuzita kaj ŝajne plu nur povas balbuti iujn delirajn frazojn en la arumana (aŭ valaha) lingvo, ŝia denaska. Jannis telefonas kun sia onklo Viktoras, la frato de Vangjo, por ĝisdatigi lin pri la situacio. Tiam la rakonto saltas en la pasintecan, en la junaĝon de Vangjo, kiun ŝi pasigis dum la periodo antaŭ kaj dum la Dua Mondmilito en ŝia vilaĝo en norda Grekio. Iun tagon dum la milito, ŝia patrino taskigas Vangjo-n porti pakojn kun manĝaĵoj al iu juna viro kun familia nomo Zaros, kiu eble ial kaŝiĝas. Ŝajne Vangjo tre ŝatas tiun Zaros. Por porti la pakojn al li, ŝi devos atenti, ke ŝi evitu du malicajn ĝendarmojn survoje, kiuj ofte miskondutas al la vilaĝanoj. Oni lernas (plia temposalto!), ke iom da tempo antaŭ tiu tago, tiuj du ĝendarmoj, kune kun pliaj helpantoj, kaptis kaj arestis multajn virojn el la vilaĝo, kiujn ili konsideris inklinaĵoj al rumana naciismo, ekzemple pro tio, ke ili sendas siajn infanojn al rumanlingva anstataŭ greklingva lernejo. La arestitaj viroj estis ĵus arigitaj sur la centra placo de la vilaĝo sub la okuloj de la ceteraj vilaĝanoj, el kiuj kelkaj priploras ilin, aliaj tamen ĝojas pri ilia malbonŝanco, kiel ja ofte okazas en homaj socioj aŭ komunumoj...

Guste kiam la aro da kaptitoj, fare de la ĝendarmoj, akompanantaj ilin, estis pretigata por ekiri al Ioanino, kun finfina celo, laŭdire, iu armea tendaro en Korinto, la ĉefulo de la taĉmento, tenante liston de nomoj enmane, laŭte vokis la nomon de iu, kiu ŝajne evitis areston. „Sterjos Zaros! Kie estas tiu bastardo? Ni ne maltrafu lin! Ankaŭ li estu arestita! Nepre!“

Sterjos Zaros estis spaciala kazo inter la anoj de la malgranda montara komunumo. Studinte en Bukareŝto kaj multe vojaĝinte al lokoj kiel Usono kaj Parizo, li estis reveninta al la vilaĝo antaŭ kelkaj jaroj, post fermo de la cirklo de siaj intelektaj kaj profesiaj strebadoj. Li estaris el ĉiuj, ne nur pro sia eŭropeca vestostilo kaj siaj strangaj ĉiutagaj kutimoj, sed, ĉefe, pro la novaj ideoj, kiujn li kunportis, ofte ĉagrenante la konserveman lokan socion, same ties „grekeman“ frakcion kiel ankaŭ ties alian. Komence li alportis deekstere diversajn malgrandajn

novigojn, kiuj tamen multe profitigis liajn samvilaĝanojn. Li persvadis, ekzemple, post multe da penado, multajn homojn akiri kaj gardi bovinojn – nekonatan bestotipon en la vilaĝo ĝis tiam – anstataŭ kaproj kaj ŝafoj, tiel ke multaj infanoj kontentiĝis per lakto kaj familioj estis savitaj de malsato dum malbonaj tempoj. Li ankaŭ trejniis multajn el siaj samvilaĝanoj pri arboreftado, por ke ili ĝuu pomojn, ĉerizojn kaj kian ajn alian utilan frukton, kiun la patrino naturo kapablas produkti ĉiujare. Je aliaj aspektoj, tamen, liaj ideoj tute ne renkontis tian transprenemon, ekzemple kiam li provis klarigi al la kunhomoj, ke estas en ilia intereso establi kooperativon por la ekspluatado de la arbaro kaj la komercado de ilia konstruligno: Anstataŭ ke ĉiu baraktu unuope, ili kundividu la kostojn kaj la fizikan laboron por ne troviĝi fine dependaj de la favoro de la kapricoj de ĉiu senkompata lignokomercisto el Ioanino aŭ Kozano. Tiuj ĉi aferoj ne estis bone komprenitaj de la modestaj hakistoj, iuj eĉ konsideris ilin komunismaj.

Ankaŭ la „rumanema“ frakcio multfoje ne komprenis lin kaj eĉ rompis rilatojn kun li, ĉar li, kvankam li estis ido de ilia propra eduka sistemo kaj sinteno, de tempo al tempo ĉantis al ili, ke ilia rolo estas malutila kaj iliaj klopodoj vanaj, kaj ke ĉiuj tiuj milionoj de la rumana ŝtato por lernejoj kaj preĝejoj en valaĥaj komunumoj estas skandala monmalŝparo sen iu reala efiko, dum fakte aliaj lokoj en Rumanio restis tute malriĉaj kaj havis pli grandajn bezonojn, kaj fine ke la sola afero, kiun ili atingis, estas sensenca kaj detrua divido de la valaĥaj komunumoj kaj nenio alia.

Sterjos Zaros aĝis jam preter tridek, sed lia eleganta prezentiĝo, iom la ĝentileco en siaj manieroj kaj vortoj, kune kun sia eŭropeca „aero“, igis lin aspekti multe pli juna. Do ne daŭris longe, ĝis unutage hazarde lia rigardo interkruciĝis kaj intergluiĝis kun tiu de la juna Vangjo sur la antaŭkorto de la preĝejo, kaj okazis tio, kio okazas al ĉiuj junulinoj, kiuj sentas, ke ili nun forlasis la senkulpecon de sia infanaĝo por ekvagadi tra la nekonata mondo de la suferoj de amo. Zaros pasis kaj fiksiĝis kiel sago profunde en ŝian penson, kaj li restis tie nokte kaj tage.

Vangjo zorge fermis la pordon de la garbejo, por ke neniu najbaro ŝin aŭdu, firme tenis la pakajon sub siaj brakoj kaj malsupreniris laŭ la pavimŝtonoj, kiuj kondukis al la ponto. Ŝi provis kiel eble plej normale marŝi, por ne vekti la suspektojn de iu ajn, kiu eble vidus ŝin. Pli tamen ŝi klopodis regi sian korbatadon, kiun ŝi sentis kvazaŭ batoj de marteletoj sub sia sternumo kaj tra sia tuta korpo. Baldaŭ tagiĝontis, kaj la tago promesis esti klara, sen pluvo aŭ neĝo. Alproksimiĝante al la rivero, ŝi aŭdis ĝian nekutime laŭtan muĝadon, senĉesan supernaturecan sonon, kvazaŭ ĝi venus el la intestoj de alia mondo. Ŝi neniam antaŭe vidis la riveron tiel ŝvelinta. Grandega, senfina, bruna ŝaŭma kaĉo, kiu portis kun si branĉetojn, arbustojn kaj eĉ kompletajn ŝtipojn. La akvo furioze batadis la du bazojn de la ponto, tiel ke oni pensis, ke estus nur demando de tempo, antaŭ ol ĝi kolapsus kaj ĝia majesta arko rompiĝus.

Per rapidaj paŝoj, Vangjo atingis la pinton de la ponto kaj staris tie dum momento por rigardi la mirindan akvamasan

spektaklon sub siaj piedoj. Kaj tiam ŝi subite ekvidis, inter ĉiuj materialoj

violente kunportataj de la rivero, grandan elradikigitan pinon, kiu en la kirloj de la akvo leviĝis kaj minace proksimiĝadis al ŝi. Kaj tuj, dum ero de sekundo, ŝi ekvidis antaŭ si, terurite, la finon de sia m. allonga vivo, kaj ĉio, kion ŝi sukcesis fari per fulmaj refleksoj, estis kovri sian vizaĝojn per la manoj kaj surgenuiĝi, eligante krion elinterne, „Dumnidzâle!“ (arumane: „Ho Dio!“). Ŝi atendis, ke en la tuj sekva momento ŝi sentos grandan skuon kun laŭta sono pro la bato kaj sekve turmente droniĝos en la glacimalvarma torento.

Ŝi ne sciis, kiom longe, sekundojn aŭ eble eĉ minutojn, ŝi tiel restis senmova surgenu – ŝajnis, ke la minaca pino, kvazaŭ mirakle, lastmomente „ĝentile kliniĝis“ antaŭ la ponto kaj pasis sub ĝi, lasante ŝin netuŝita – kiam Vangjo sentis du fortajn manojn kapti ŝin je la brakoj kaj levi ŝin sur ŝiajn piedojn.

„Kien vi iras, etulino, tiel frue matene?“, ŝi aŭdis diri konatan, severan viran voĉon. Ŝi turnis la kapon kaj abrupte revenis al la realo, rigardante kun teruro en la sinistrajn vizaĝojn de la ĉefserĝento kaj lia asistanto. Dum ili marŝigis ŝin al la alia flanko de la ponto, la ĉefserĝento forprenis ŝian monujon, ekzamenis ĝian enhavon kaj kun feroca grimaco demandis ŝin: „Kie li estas? Diru!“ En liaj arogantaj okuloj, Vangjo rimarkis tiun briladon, de kiu oni ne scias, ĉu ĝi venas de malamo aŭ de neestingebla volupto aŭ ambaŭ. Ĉar Vangjo estis preskaŭ certa, ke estis ĝuste lia ombro, kiu malaperis kurante en la mallumon, malantaŭ la forlasita kabano apud la draŝejo de la vilaĝo, tiun vesperon dum la pasinta somero, kiam ŝi kaj Zaros, ja ŝia Sterjos nun, kuniĝis la unuan fojon, per siaj animoj kaj per siaj soifantaj korpoj.

Antaŭ ol ŝi sukcesis elpensi taŭgan senkulpigon, iun mensogon por eskapi ĉiuokaze, ŝi subite sentis fortan frapon sur sian rozkoloran vangon, poste alian, kaj ŝiaj oreloj komencis fajfadi. „Aĥ rumaninaĉo, ni sendos vin ĉiujn rektakorpoj al Rumanio! Diru, kie vi kaŝas lin?“ „Mi ne scias ... Mi ne komprenas, kion vi diras al mi ... Mi ne scias!“ Tiel ŝi nun laŭte kriegis post ĉiu plia vangofrapo, kaj tiuj frapoj tiam transformiĝis en pugno- kaj piedbatojn. „Ni sendos vian patrinon kune kun la aliaj, se vi ne diros al ni! Vi sciu tion!“, minacis ŝin la ĉefserĝento, kiu, turninte sin al sia kolego, diris: „Aĥileas, iru nun tuj kaj arestu ankaŭ Marica-n kaj enŝlosu ŝin en la stacio. La junulino ne raciĝas.“

Eĉ sole la penso, ke la hejmo kun la kvin infanoj perdos la patrinon, dum la patro estis ĉe la fronto kaj neniu sciis, ĉu li iam ajn revenos viva, panikigis ŝin preter imageblo. La dilemo estis tormenta kaj la tempa fenestro por trafi elekton kvazaŭ nula. „En la garbejo de Lala-Tuŝjosi!“, ŝi singultis, falinte sur la pavimŝtonaron kaj penante permane forviŝi la sangon, kiu eliĝadis el ŝia nazo.

„Se vi mensogas al ni, malbonŝanculino mia, vi estas finita!“, la ĉefserĝento kriis al ŝi forirante, kaj dume li elujigis sian revolveron por kontroli, ĉu ĝi estas plensarĝita je kugloj.

Vangjo malrapide leviĝis, skuiĝis kaj rektigis siajn vestaĵojn, kiuj estis plenaj de seka herbo kaj malpuraĵo, kaj sidiĝis mallonge sur granda ŝtono apude de la vojo.

Ŝi deziris en sia koro, ke Zaros ilin vidu de malproksime kaj sin protektu, fuĝante ĝustatempe reen en la arbaron, kie li jam estis kaŝinta sin la tagon, kiam oni arestis ĉiujn aliajn; ke ili entute ne trovu lin, eĉ se ŝi devus elteni pliajn batojn denove kaj denove. Kaj en la kazo, ke ili kaptos lin, ŝi ne volis vidi lin trenata kiel hundo, eble eĉ batata, antaŭ si. Dum tiuj malesperaj momentoj, ŝi sentis sin ne kapabla moviĝi, kvazaŭ ostiĝinta, kaj ne sciis kion fari. Ŝi turnis sian rigardon al la ponto kaj la furiozanta rivero kaj lasis ĝian muĝadon trapikadi ŝin, en ŝiajn orelojn, ŝian kapon, ŝian spinon kaj ĉiujn nervojn ĝis ŝiaj fingroj kaj piedfingroj. Kaj tiam ŝi komencis senti sian tutan korpon tremi, vibri, batali ene de tiu muĝado. Por momento ŝi pensis aŭdi iaajn praajn voĉojn eliri el la ŝlimplena akvo kaj sonoradi laŭ kanto tre hejmeca:

Mja kori psilí ljani / se jofiri káthete / kjolo silojázete: / Pos tha to peraso egó / tuto to tholó neró? (greke: Knabino alta svelta / sur ponto sidigadas / kaj dume nur pensadas: / Kiel nun transpasos mi / malklaran tiun akvon ĉi?)

Ŝi staris kvazaŭ perdita ĉe la flanko de la ponto, kiam ŝi subite aŭdis el malproksimo, de tie, kien estis foririntaj la ĝendarmoj, pistolajn pafojn: Unu, poste alian, kaj sekve tri pliajn...

„Ili mortigis lin!...“, ŝi ekkriis kun okuloj malfermegaj pro teruro, kaj tiam ĉio glaciigis ene de ŝi, la tempo, la sentoj, la menso. Tuj poste, nekonata forto, kontraŭ ŝia volo, ŝajnis movigi ŝian korpon, pelis ĝin por kuregi rapide trans la ponton, tra la serpentumaj pavimvojoj kaj mallarĝaj stratoj de la vilaĝo, por atingi ŝian hejmon, por enŝlosi sin tie dum kvardek tagoj en ĉambreto, sen manĝi kaj sen paroli kun iu ajn, ĝis la vilaĝanoj fine diris, ke ŝi fariĝis plene freneza.

„Kiaj rakontoj estas ĉi tiuj ...“, pensis Jannis, fininte la longan telefonan interparolon kun onklo Víktoras, kaj iris kontroli, ĉu ĉio enordas en la ĉambro, kiun li estis aranĝinta por sia patrino. Li trovis ŝin kuŝanta senmove sur la lito, kun buŝo kaj okuloj malfermaj, rigardanta sendifine al la plafono. „Panjo!...“, li kriis al ŝi, terurigite, kaj lia voĉo tuj perdis ĉian forton. Li rigardis ŝian ostecan vizaĝon kaj sentis buklon en sia gorĝo forpreni lian spiron. Iam, feliĉe, la patrino palpebrumis kaj sekve fiksas sian rigardon al la lia. „Nu vreaám s-u fak ... Nu vreaám ...“ (arumane: „Mi ne volis fari ĝin ... Mi ne volis ...“), ŝi flustris al li, kaj el inter ŝiaj sekigintaj lipoj komencis aŭdiĝi ia malrapidritma, nekohera melodio, kvazaŭ murmuro, kiel lasta milda ploro.

19




LingvaFEST'
10.+11.09.22
IN DER ESPERANTO-STACIO
IM BAHNHOF VON HALBE

32




LingvaFEST'
10.+11.09.22
IN DER ESPERANTO-STACIO
IM BAHNHOF VON HALBE

FEST DER SPRACHEN
KONZERTE WORKSHOPS MINIKURSE
PROGRAMM: www.esperantostacio.com